

EL POPOLA ĈINIO



Jun. 1953

外文出版社
出版部
出版科

NI KONSTRUAS POR LA INFANOJ KAJ PACO

Sung Ĉing-ling

Prezidanto de la Landa Komitato de l' Ĉina Popolo por Defendo de Infanoj

Estas regulo de vivo, komuna al ĉiu lando kaj popolo, ke la sumo-tuto de ĉia laboro kaj klopodo devas havi kiel rezultaton la plibonigon de la sano kaj bonfarto de la infanoj. Tio estis unu el la movigaj fortoj, kiu pelis la mondon antaŭen de tempo antaŭmemora—doni al la infanoj pli bonan nivelon de vivado, doni al ili pli da ĝojo el vivo ol iliaj gepatroj povis akiri, provizi la bazon, de kiu ili povis ekiri sur siaj propraj piedoj kaj fari la mondon taŭga por iliaj bezonoj.

Ĉinio certe ne estas escepto de tiu ĉi regulo. Estis ĉiam unu el niaj profunde enradikiĝintaj tradicioj plenumi niajn devojn al la infanoj. Sed en tagoj pasintaj estis malfacile, se ne neeble, por la plejparto de la ĉina popolo vivi laŭ tiu regulo kaj doni al siaj infanoj starton kaj plialtiĝon en vivo—ĉio, kion ili povis fari, estis subteni vivon mem. En tro multe da kazoj eĉ tio ne estis ebla. Mi opinias, ke la suferoj de ĉinaj infanoj en la pasinteco kaŭzitaj de milito, malbona regado kaj iliaj devenaĵoj—inundo, malsato kaj pesto—estas tute familiaraj al la tuta mondo. Ili estas neforigebla parto de niaj propraj memoroj.

Tial kun granda feliĉo, la ĉina popolo diras: “Tiu tagoj jam forpasis por ĉiam!” Hodiaŭ la registaro de Ĉinio estas firme en la manoj de la granda plimulto, kiu, kun klara konscio, tiel multe faras por malebligi militon, kaj kiu regas laŭ siaj propraj interesoj. Tiu ĉi estas centoj da milionoj da kapablaj manoj direktataj de vekigintaj kaj penantaj mensoj, kiuj scias kiel konstrui kaj kiel protekti la gajnojn ellaboritajn el niaj riĉfontoj. Kion ili konstruas, ili decidas transdoni al siaj infanoj. Kaj ili protektas ne nur la novan signifon kaj belon de siaj propraj vivoj sed ankaŭ la estontecon de siaj infanoj.

Ĉinio, laborante je sia unua Kvinjarplano, estas nacio, kiu estas pulsobatanta de landlimo al landlimo pro paca konstruado. Pasas neniu tago sen ke iu produkta rekordo estas superita; apenaŭ semajno aŭ monato sen ke iu nova, vasta arco malfermita por ekspluatado, iu fabriko, akvokonserva projekto aŭ komunika linio malfermiĝas por trafiko. La vidaĵoj kaj scioj de konstruado trafas la okulojn kaj orelojn je ĉiu turniĝo, kaj ĉiu estas signo de la progreso en la vivrimedoj de la konstruantoj.

Meze de tio, kiel esenca parto de ĝi, la tasko zorgi pri la bonfarto de patrinoj kaj infanoj ricevas senekzemplan atenton. Estas parto de la fundamenta leĝo de nia lando, ke ni plenumas niajn devojn al la infanoj kaj tiuj, kiuj naskas ilin kaj estas respondecaj por ilia junaĝa nutrado. Oni povas diri, ke neniam la ĉina popolo plenumis siajn devojn tiel bone. Nia lando neniam tiel abundis kiel hodiaŭ je organizoj de patrin-kaj infan-prizorgo praktikantaj la plej modernajn, scincajn metodojn. Neniam ni povis provizi edukadon por tiom da infanoj kiel ni faras nuntempe, edukado plena de la plej bona el niaj nacia kaj monda kulturoj; edukado bazita sur amo de nia propra popolo kaj de nia homfrato; bazita sur la amo de laboro, kamaradeca teama spirito kaj la deziro plenumi grandajn aferojn

por la popolo. Neniam la perspektivo por nia lando, kaj speciale tiu por niaj infanoj, aspektis tiel brila, kiel nun. Tio estigas optimismon kaj memfidon, kiuj trapenetas ĉiun atomon de nia atmosfero.

En nia feliĉo, tamen, ni ne permesas al ni mem forgesi la malĝojon, kiu ekzistas aliloke en la mondo. Ni konas la kruelaĵon, kiu eĉ en tiu ĉi momento frapas la gepatrojn, kiuj devas vidi siajn infanojn alfronti la suferojn de malfacila vivo sen la plej eta ĝuo de infanaĝo aŭ juneco. Ni ne povas ne profunde kortuŝiĝi, spertinte mem nur antaŭnelonge tion saman. Estas neeble por ni ne gustumi la larmojn de niaj koreaj, Vietnamaj kaj Malajaj fratinoj, de niaj aliaj Aziaj, Afrikaj kaj Mezoriantaj fratinoj. Nek povas ni ne vidi ke la politiko “armiloj antaŭ ĉio” estas fermanta vartejojn kaj malpliganta la lernejoarojn de britaj infanoj, jetis du milionojn da italaj kaj kvar milionojn da Usonaj lernejaĝaj infanoj sur la stratojn, estas deviganta milionojn da infanoj kaj dekelkjaruloj al fabrikstabloj aŭ al dorsrompa laboro tia, kia minado, en Hispanio, en Bolivio, en Usono kaj aliaj lokoj, estas deviganta la japanan popolon al la vendado de siaj infanoj, estas mortiganta 50% de la nove-naskitoj en Turkio.

Rekonante tion, la ĉina popolo estas indigna, ke tiaj aferoj estas permesataj daŭri en tiu ĉi, la Dudeka Jarcento. Ni protestas energie kontraŭ la daŭrigo de tia suferado, de la krima malhelpo de la fizika kaj spirita disvolviĝo de milionoj, la kripligo kaj mortigo de aliaj milionoj da infanoj. Ni rekonas ilin kiel la minacon, kio ili estas al ĉiuj infanoj, al niaj propraj sukcesoj kaj al tiuj de aliaj landoj. Ni denuncas ilin en ĉiu okazo kiel la malhelpaĵon, kio ili estas al la progreso de la mondo.

Kiel alie ol per paco tiuj ĉi maljustaĵoj povas esti justigitaj? Kiel alie ol per paco la ĉina popolo kaj ĉiuj popoloj povas efektiviĝi la deziron de siaj koroj, siajn planojn por la infanoj? En tiu ĉi afero tiel intime envolvita kun ĉiuj ĉefaj problemoj frontantaj la mondon hodiaŭ, paco, en kiu ĉiuj popoloj elektas sian propran vojon al prospero, kaj tiam antaŭeniras al ĝia konstruado, estas la sola solvo. Pro tio paco estas la espero kaj postulo de la ordinaraĵoj homoj en ĉiu lando. Estas en tiuj ĉi vicoj, ke la ĉina popolo marŝis, estas marŝanta kaj daŭrigos marŝi.

Ni faros ĉion eblan por malebligi militon etendiĝi, haltigi ĉiujn nunajn militojn kaj malhelpi iun ajn provon de estonta milito. Freŝdataj okazintaĵoj denove klare montris ke tio estas la sinteno de la ĉina popolo.

Ĉinio daŭrigos rapide la konstruadon de sia nova vivo en kunordo kun ĉiuj tiuj irantaj la saman vojon, en laboro kun tiuj, kiuj deziras esti amikoj. Ĉinio daŭrigos la procedon fari siajn infanojn sanaj, feliĉaj kaj malhavantaj nenion kion ili bezonas por plena kaj ĝoja vivo. Ĉinio daŭrigos sian senĉesan lukton por paco. En tio ni estas plenumantaj nian devon al la infanoj de la mondo—la trezoroj de nia estanteco kaj la mastroj de nia estonteco.

Reveno al Libero ĉe Kaesong

Nia Speciala Korespondanto

“Bonvenon ree al la patrio!”

“Ripozu kaj resaniĝu. Partoprenu la pacan konstruadon!”

Diverskoloraj afiŝoj kun ĉi tiuj sloganoj estas ĉie videblaj ĉe la verdaj kaj blankaj tendoj en antaŭurbo de Kaesong por malsanaj kaj vunditaj koreaj popoloj armeanoj kaj ĉinaj popolaj volontuloj ĵus revenintaj de la insuloj Koĵe kaj Ĵeĵu. La afiŝoj plej bone karakterizas la varman akcepton kaj atentan zorgon al tiuj homoj, kiuj elbatalis sian revenan vojon el la teruroj de perforta “kribrado” en Usonaj militkaptitejoj.

Printempa sunbrilo inundas la vilaĝon de tendoj. Centoj da malgrandaj koreaj kaj ĉinaj standardoj flirtas sur tend-stangoj. Nove transplantitaj junaj pinoj kaj sovaĝaj floroj borderas netajn vojojn. Antaŭ ĉiu tendo, soldatoj en novaj uniformoj kaj vatitaj surtutoj sidas sur benkoj kaj seĝoj, legante aŭ ludante kartojn, kun siaj lambastonoj kuŝantaj apude. Mi moviĝis inter la gajaj grupoj, kiuj atente legas la bildajn gazetojn: “Rigardu tiun ĉi gigantan digon sur Huaj-rivero!” “Vidu kiom da homoj venis el aliaj landoj ĉeesti en la Packonferenco en Pekino!” “Jen la Nacia-taga parado en Pekino, kaj Prezidanto Maŭ sur Tjan'an-pordego!”

Negrave malsanaj kaj vunditaj soldatoj konstruas pliajn florbedojn apud siaj tendoj. Unu grupo finas la konstruan laboron de granda florbedo en formo de la Koreia duoninsulo, markita per miniaturo de elektraj pilonoj, kun Pjongĵang kaj aliaj urboj montritaj per brilaj koloraj ŝtonetoj kaj la plej belaj floroj. Aliaj faras modelojn de la paca kolombo kaj naciaj standardoj. Tio ĉi bone komprenigis nin, ke sendube tiu ĉi sama forta urĝo konstrui kaj beligi sian patrolandon subtenis tiujn soldatojn en ilia brava batalo kontraŭ la invadantoj eĉ en la militkaptitejoj.

Mi eniras tendon kie flegistino estas leganta novaĵon pri lasta batalo ĉe la monto ‘Maljuna Kalvulo’ por grupo da blinduloj. kelkaj el kiuj perdis vidkapablon rezulte de larm-gasa atako fare de Usonaj gvardianoj kontraŭ ili. Larĝaj ridetoj brile trakuras iliajn vizaĝojn dum ŝi rakontas la finan malvenkon de la malamiko. Kaj en alia tendo kelkaj senmembraj homoj ludas ŝakon kun apude staranta flegistino kiu movas la ŝak-pecojn por ili. Kiam la ludo estas finita, la flegistino nutras ĉiun el ili per glaso da pulvora lakto insistante ke ili eltrinku. Larmoj de dankemo ŝprucas el okuloj de la soldatoj. Unu el ili hezite eletendas amputitan brakon al la flegistino por manpremo, dirante, “Kamaradino, vi ĉiuj estas tiel afablaj.” La knabino varme premas lian stumpon dirante, “Vi ree estas ĉe ni.”

La atmosfero de ĝojo, tiel profunda sed tiel kvieta, regas en ĉiu angulo de la por-

tempaj hospitaloj. Ni iras preskaŭ sur piedpintoj ke eĉ knaro de botoj ne rompu la trankvilon kiun tiuj ĉi homoj fine estas ĝuantaj post travivado de tiom multe da perfortaĵoj.

Ĉiun tagon, sub-ĉielaj prezentadoj estas donitaj de Koreia ŝtata teatra grupo, la K. P. A.-a Kanta-danca Grupo kaj Ĉ. P. V. -a arta kaj varietea spektaklo-grupo en la hospitaloj. Revenintaj homoj avide ensorbas ĉiun peceton de iliaj ŝatataj naciaj dancoj kaj kantoj. Blinduloj petas esti sidigitaj en la unua vico tiel ke ili povu “senti ĝin eĉ se ni ne povas vidi ĝin.” La avida aŭskultantaro plurfoje pet-kriadas “Bis! bis!” por ŝatataj kantoj, la kantado de kiuj en Usonaj kaptitejoj kostis la vivojn de tiom multe da iliaj kamaradoj.

Sed amaraj memoroj de Koĵe kaj Ĵeĵu ankoraŭ foje kaj foje reaperas kaj jetas sian ombbron sur la vilaĝon de liberaj homoj.

Kelkaj kripluloj helpe de blanke-vestitaj flegistinoj promenas sur siaj lambastonoj. Unu el ili haltas kaj fiksrigardas longe kaj malĝoje la flirantajn ruĝajn standardojn. Li ĝemas profunde kaj diras al la flegistino: “Kiom el ni estis mortigitaj de Usonaj kaj Kuo-mintang-aj agentoj nur pro tio ke ni volis hisi nian nacian standardon en la malamikaj kaptitejoj!”

Proksime de unu tendo, grupo da ĵurnalistoj intervjuas junan knabon kiu havas nenium membron. Li suferis nur de malgrava frostovundo, la unua kuracado, kiun la malamiko al li donis post unu monato, estis amputi ambaŭ liajn manojn kaj piedojn. “Mi estas nur dudekdu-jara, kaj ili faras min kripla kiel tio ĉi!” li konkludis maldolĉe, mordante siajn lipojn. Alia homo demetas sian tunikon kaj montras al ĵurnalistoj grandajn cikatrojn sur sia maldekstra brako. “Tajĉanaj agentoj batis min senkonscia kaj tatus kvar ideogra-

En la provizora hospitalo la revenintaj ĉinaj volontuloj ĝuas bonan kuracadon, sufiĉan nutraĵon, amuzaĵojn kaj novaĵojn pri ĉina konstruado.



fojn 'Kontraŭi Komunismon kaj Rezisti Rusion,' li diris. "Kiam mi rekonsciĝis, mi forigis la markon per razilo. Kelkaj kamaradoj uzis bruligitan cigaredon por forbruligi la sian."

Torturaj memoroj estas pli freŝaj en la tendoj por virinoj kie ĉiuj dudek unu kunulinoj revenis nur en la lasta tago de interŝanĝo de malsanaj kaj vunditaj kaptitoj. Unu el tiuj koreaj knabinoj, kiu estis frenezigita de Usona mistraktado, sidas en sia lito stulte gapante. Ili fervore informas la vizitantajn ĵurnalistojn pri siaj bataloj en la Usonaj kaptitejoj. Malsanaj kaj vunditaj knabinoj, kiuj rifuzis forlasi sian rajton de reenpatriigo, estis ĵetitaj en malliberejon kie ili tage kaj nokte ĝemas sen kuracado kaj medicina prizorgo. El la okdek knabinoj kiuj, laŭ ilia scio, estis vunditaj aŭ kriplitaj dum perforta "kribrado", nur ilia grupo de dudek unu estis reenpatriigita.

Korŝira estas ilia rakonto pri batadoj per kaŭĉukaj tuboj, ruinigantaj elektraĵoj, kaj torturoj elpensitaj speciale por insultoj kaj difektoj virinajn viktimojn. Kaj ĉiuj ĉi tiuj brutaj agoj estis kunigitaj kun "kribrado" kaj "reklasigado" celanta igi ĉiujn militkaptitojn timi la reiron al siaj familioj kaj hejmlandoj. La streĉitaj nervoj de la knabinoj ĉajnas esti malstreĉitaj post kiam ili rakontis kelke de tiuj teruraj travivaĵoj. Kiam flegistinoj helpas ilin kuŝigi sur neĝblankan litajon, la sang-mankaj vizaĝoj malstreĉiĝis en malforta rideto.

Sed la loko, kie la efikoj de Koje ankoraŭ regas, estas la hospitalo por 143 mensaj pacientoj en antikva

templo. Tie ĉi estas homoj kun malordaj haroj, palaj vizaĝoj kaj malplenaj rigardoj. Histeria ridado, koleraĵ kriegoj kaj murmuroj estas ofte aŭditaj. Multaj pacientoj eĉ ne memoras siajn nomojn. Sed ili ja senerare klare montras kiel ili fariĝis frenezaj. Multaj kriadas daŭre la tutan tagon:

"Lasu nin reiri al Norda Koreio! Mi estas koreo. Vi povus bati min ĝis morto sed mi ankoraŭ volas reiri!"

Kuracisto envenas por la rutina kontrolo. Iu paciento rikanas je li: "Pridemando denove? Tute necesa. Mi diris al vi antaŭ longe ke mi ne estas 'civila internigito'. Mi estas militkaptito, mi volas iri al Pjongjang!" (Estis longe konate ke la usonanoj perforte klasigis multajn milojn da koreaj militkaptitoj kiel "civilaj internigitoj" kaj transdonis ilin al la reĝimo de Singman Rhi por devigi ilin servi en la puparmeo per ŝajnigita procedo de "liberigo".) Flegistino eniras la ĉambron por inokuladi. Multaj pacientoj streĉiĝis kontraŭ la muro kaj murmuris al si mem: "Ili denove mortigos homojn! Ili mortigos!"

Sed kuracistoj kaj flegistinoj kredas ke ili povas helpi la homojn al resaniĝo. Jam kelkaj homoj flustras unu al la alia: "Kial tiuj sangavidaj diabloj ĉesis nin bati kaj insultoj? Kial ili nun ridas?"

Iu kuracisto al ni diras: "Plejmulto de tiuj ĉi kamaradoj resaniĝos. La radika kaŭzo de ilia malsano estas nun forigita. Amaj prizorgoj estos la plej bona kuracilo.

La Popola Aŭdiencejo de la Pekina Popola Registaro

Sun Ĝan-ko

"La Urbestro estas nia malnova amiko" dudek-ok-jara inĝenier-studento nomita Ŝeng diris al mi kun fiero en la aŭdiencejo de la Pekina Popola Registaro. "Se ni havas ion por diri," li daŭrigis, "ni volas tion sciigi al nia Urbestro, ĉu la afero koncernas individuon aŭ publikon kaj ĉu ni volas rekomendi, kritiki aŭ proponi ion. Se necese, ni venas persone. Alie ni skribas. La Urbestro valorigas niajn opiniojn kaj respondas ĉiun leteron en la daŭro de kelkaj tagoj."

Ĉifoje li venis por kritiki antaŭ Urbestro Peng la Konstruan Buroon de Pekino, kies laboristoj, pro ne sufiĉa konsiderado, plantis arbidojn tuj apud la balustrado de Ŝiĉahaj-lago, pejzaĝloko en Pekino. Dimanĉe, dum remado en la lago, la urbano trovis, ke la kreskantaj arbidoj certe iam detruos la balustradon, kaj li decidis fari la viziton.

La du milionoj da loĝantoj de Pekino jam konstatis antaŭ longe laŭ siaj propraj spertoj, ke la Popola Registaro estas protektanto de ilia hodiaŭa bela vivo kaj ilia gvidanto en la kreado de ilia feliĉa estonteco. Ili bone unuiĝas sub la Popola Registaro, konfidas al ĝi kaj ĝin subtenas. Ili senĉese skribas al ĝi leterojn kaj persone ĝin vizitadas por oferi al ĝi sian saĝon kaj kreaĵon, aŭdigi al ĝi siajn postulojn kaj opiniojn. Grandan atenton kaj bonan zorgon la Popola Registaro donas al ĉi tia politika respondeco de la popolamaso kaj konsideras la aŭdiencon al la popolamaso kiel tre gravan rimedon por intime interrilati kun la popolamaso. Dank' al la aŭdiencoj al la popolamaso, la Popola Registaro povas fari siajn politikojn ĝustaj kaj plibonigi sian laboron ĝustatempe.

Jam frue en la jaro 1950, la municipala popola registaro asignis specialajn laborantojn prizorgi la

leterojn de la urbanoj kaj akceptadi la popolajn vizitantojn. Sekve de la multiĝo de la leteroj kaj vizitantoj, starigis en 1952 specialaj organizoj nome Koresponda Fako kaj Popola Aŭdiencejo por prizorgi la ricevitajn leterojn de la popolanoj kaj akcepti la vizitantojn.

En la oficejo de la Koresponda Fako, mi renkontis iun urbanon nomatan Ŝi Fu-ŝing, kiu jam kvarfoje skribis al Urbestro Peng kaj faris pli ol dek proponojn kaj kritikojn por plibonigi laborojn de la registaro. Li vidis amason da forĵetaĵo, kie muŝoj ekgeneriĝis, kaj li tuj petis Urbestron Peng, ke oni tuj ĝin forigu; li vidis en strateto pluvakvejon en kiu moskitoj jam komencis generiĝi, kaj li kritikis la distriktajn laborantojn, ke ili ne sufiĉe bone zorgis pri la sanitara laboro; kaj li ankaŭ proponis konstrui publikan necesejon ktp. Estas dank' al la kontrolado kaj partopreno de la aktivuloj kia li, ke la sanitara laboro de Pekino rikoltis admirojn de la internaciaj amikoj.

La kamarado kiu zorgas pri la akceptado de vizitantaj urbanoj, prezentis al mi sesdekjarulon Feng Kaj, kiu ofte vizitas la oficejon. Kortuŝite de la prosperiĝaj signoj en popola Pekino kaj popola Ĉinio, la maljunulo deklaris, ke li volonte dediĉos siajn lastajn jarojn kaj energiojn al la konstruado de popola Pekino. Kvarfoje li venis en la Popolan Aŭdiencejon. Li proponis plilarĝigi iun straton, kie estas vigla trafikado kaj plurfoje okazis akcidento. Li proponis, ke oni propagandu trafikajn regulojn al la kamparanoj vizitantaj Pekinon por eviti akcidenton. Ĉiufoje, kiam lia propono estas aprobita, rido ekfloras sur lia vizaĝo. "Jardekojn mi travivis en la malnova socio," li diris, "kaj sennombrajn maljustaĵojn mi vidis kaj spertis kun kolerego. En tiu epoko, kiam bonuloj devis suferi kaj malbonuloj superregis, ja neniu kuragiĝis kritiki pri la malbonfaroj. Sed nun la urbestro deziras aŭdi mian kritikon se oni fuŝas sian laboron."

La Popola Registaro, kiu rigardas la leterojn kaj vizitojn de la popolanoj gravaj rimedoj por trovi siajn mankojn en la laboro, faras seriozajn esplorojn kaj plibonigas la laboron laŭ la voĉoj de la popolanoj. Foje Urbestro Peng Ĝen ricevis leteron de Ĝjang Kuej-ĵing, flegistino en Ŝiĝjaŭ-ripozhejmo de la Civil-administra Buroo kiu kritikis la burokratisman labormanieron de la gvidantaro de tiu ripozhejmo, kiu kaŭzis la malfruigon de la resaniĝo de pacientoj. Tuj kiam Urbestro Peng legis la leteron, li ekspedis dudek-homan grupon estratan de la direktoro de la superdirita buroo por fari detalan esploron. Kiam la esplorado elmontris ke plejparto de la enhavo de la letero de la flegistino estas vero kaj ke demokrata vivo tie estas subpremata, la administrantaro de la ripozhejmo estis plene reorganizata. Ankaŭ dank' al la leteroj de la popolo, la municipala registaro ĝustatempe korektis eraran verdikton de la juĝejo, punis nedisciplineman policanon kiu insultis urbanon kaj honoris laborantojn en la registaro, kiuj sinforgese elsavis domojn de urbanoj en pluvego.

Krom proponoj pri la urba konstrulaboro kaj kritikoj pri individuaj laborantoj en la registaro, la loĝantoj sciigas per letero aŭ vizito al la registaro ankaŭ siajn petojn por helpo solvi siajn problemojn de ĉiutaga vivo. La popolanoj kredas ke ilia urbestro-amiko tre



Ĝuo Ŝen akceptas en la nomo de Urbestro Peng Ĝen 60-jaran Feng Kaj, kiu estas ofta vizitonto.

zorgas pri ilia propra intereso. Ja ne vana estas ilia konfido, ĉar ĉiuj iliaj raciaj postuloj estas plenumitaj. Ĉiu kiu petis helpojn por solvi sian veran malfacilon en vivo, ricevis tion; kaj ĉiu kiu ne povas pagi por kuracado de sia grava malsano ricevis senpagan kuracadon nur per peto al la Popola Registaro. Huang Jun-huj, kiu suferis gravan cerbomalsanon, ne havis monon por ĝin kuraci kaj ne povis daŭrigi sian lernadon, estis tre malĝoja. Li skribis al la urbestro por helpo, kaj li tuj ricevis atestilon por senpaga kuracado de koncerna fako laŭ instrukcio de la urbestro kaj monatan subvencio de 150,000 juanoj por subteni lian vivon. Nelonge poste, multe boniĝis lia sanstato kaj li denove vizitadis lernejon. Nur por solvi tiajn problemojn, la Pekina Popola Registaro elspezis 2400 milion juanojn en 1952.

Urbestro Peng Ĝen kaj Vicurbestroj Ĝang Joŭ-ju kaj U Han persone prizorgas pri la leteroj kaj vizitoj de gravaj signifoj. Ĉiuj ili persone respondis al iuj el la leteroj kaj akceptis iujn el la vizitantoj. La laboro de la Koresponda Fako estas sub ilia konstanta kontrolado.

Kamarado Ŝi Kan, estro de la Koresponda Fako, prezentis al mi la laboron de sia fako kun granda intereso. Ĉiutage, tie la laborantoj tralegas la ricevitajn leterojn kaj akceptadas la vizitantojn kun sento de karulo. Estas granda ĝojo por ili vidi la kontentigan solvon de problemoj kaj la vizitantojn forlasi la Aŭdiencejon kun radiantaj kaj ridetantaj vizaĝoj. Ili ĉiuj arde amas sian laboron kaj bone ĝin faras. Ili starigis serion da laborsistemoj por garantii, ke neniu demando restu sen respondo kaj neniu problemoj estu neglektita. La ĝeneralaj demandoj aŭ problemoj estis de ili responditaj aŭ solvitaj en la kuranta aŭ sekvanta tago kaj la gravaj problemoj estas transdonataj en la kuranta tago al la urbestro aŭ vicurbestroj por konsidero kaj solvo aŭ ili estas transdonataj al la kunsido de la faktestroj. Iuj problemoj estas solvitaj de koncernaj fakoj kaj aliaj estas solvitaj de la Koresponda Fako post enketado kaj pristudo.

La nombro de leteroj ricevitaj pli ol duobliĝis en 1952 kompare kun tiu en 1951, kaj la nombro de vizitoj pli ol duobliĝis. Tiu ĉi intima kontakto inter la popolo kaj la registaro estas plifortiĝanta tagon post tago.

La Blovfornego N-ro 8

Ŝju Ĉi


Je la 11a de marto ĉijare, granda amaso da laboristoj kolektiĝis ĉirkaŭ la teraso de la alta blovfornego n-ro 8 de la Fera-ŝtala Kompanio de Anŝan. Du grandaj kvin-stelaj ruĝaj flagoj ondadis super la 60 metrojn alta fornego. Malgrandaj flagoj flirtis ĉe la kontrolejoj kaj oficejoj. Post momento la spirado de la unua aŭtomata blovfornego de Ĉinio estis komenkota. Tiu estis momento kiun la laboristoj kaj teknikistoj de Anŝan longe atendis depost la tago, antaŭ ok monatoj, kiam ili komencis rekonstrui la malnovan, ruinigitan blovfornegon forlasitan de la japanoj kaj Kuomintang.

Je 10.12 atm. la unua ruĝa fluo de fandita fero sin verŝis el la spil-truo. Ĝia okulpika brilo lumigis la vizagojn de la laboristoj. Estiĝis ĝojega aklamado.

Mi staris apud Vic-administranto Ĝaŭ, ĉefo de konstruado. Jam por multaj noktoj li ne bone dormis, sed li estis plena de energio. Li ĝuis tiun ĉi treege intensan vivon. Ekscitite li diris al mi: "Tiu ĉi estas granda evento en la historio de la fera-ŝtala industrio de Ĉinio."

Li klarigis ke en la fino de 1952, la fandfero produktita en Ĉinio estis jam 98.9 procentoj de la plej alta jarprodukto de la estinteco. Nun, kun la funkciado de la potenca blovfornego n-ro 8 kaj la konstruado de aliaj, la produktado tuj superos antaŭajn rekordojn. Tio garantias grandan provizon de fero kaj ŝtalo por la unua kvin-jara plano de Ĉinio. Jen estas elstara atingo de ĉina teknologio kaj la sperto akirita ĉi tie estos plenplene utiligata en la konstruado de aliaj grandegaj aŭtomataj instalaĵoj.

La Blovfornego N-ro 8 komencas produkti.



Certigite ke ĉio estis en bona ordo, ni iris al lia oficejo kie Vic-administranto Ĝaŭ detale rakontis al mi pri tiu fornego.

El la Malnova al la Nova

La originala blovfornego n-ro 8 estis planita kaj konstruita de iu germana firmo komisiita de japanaj imperialistoj en 1939. Teknike, ĝi ne estis fierindaĵo. Ĝia produktovo estis malalta. La japanaj posedantoj ne klopodis eĉ pri la plej fundamenta sekurec-antaŭzorgo por la laboristoj. Por ili la vivoj kaj membroj de ĉinoj neniam valoris. Malfermante kaj fermante skori-aŭ spil-truojn, la laboristoj estis en konstanta danĝero de vundiĝo pro gaso, brul-varmega skorio aŭ fandita metalo. Fakte multaj estis serioze vunditaj. Brulvundo estis oftaĵo.

En 1945, post la venko super Japanio, produktado ĉesis. Nur la malplena ŝtalskeleto de la fornego restis post la detruo kaj rabo fare de la forpelitaj japanaj kaj Kuomintangaj trupoj. La paralizita giganto staris senfara por ok jaroj.

Hodiaŭ la fornego estas preskaŭ tute nova. Ĝi estas aŭtomate ŝargata kaj direktata per elektro. Elektre celita "pafilo" manipolata de malproksima direktilo estas uzata por sigeli la spil-truojn dum kelkaj sekundoj; nun la laboristoj ne plu estas en danĝero de brul-vundiĝo. La blovon de varma aero al la fornego provizas nova kaj plibonigita speco de brul-ĉambro. Soveti-farita aŭtomata registrilo donas ampleksan, minut-post-minutan registron de la procedoj okazantaj interne de la fornego. Tio ebligas la plej ekzaktan direktadon de la tuta procedo fari la fer-mineralon en fanditan metalon.

La blovfornego n-ro 8 estas efektive tuta kompleksa serio da diversaj instalaĵoj kaj helpaj projektoj inkluzive de koakso-fornoj, kemiaj kromproduktaĵ-fabrikejoj, turbino-blovilo ktp. La solvo de ĉiuj kompleksaj problemoj pri la efektivigo de tiuj ĉi projektoj estas nedisigeble kunigita kun la helpo de Sovetunio. La junaj desegnistoj plenumis sian laboron laŭ unuapafa plano sugestita de Sovetiaj specialistoj. La plej moderna ekipaĵo, inkluzive de aŭtomataj maŝinoj, venis el Sovetunio. La plejparto de ili estis neniam antaŭe vidita en Ĉinio, tamen ĉio ekiris seninterrompe kiam la konstruado komenciĝis. La kaŭzo kuŝis en tio, ke antaŭ la komenco de la konstruado, la Sovetiaj specialistoj aranĝis kursojn por la konstruantoj por du monatoj kaj depost januaro ĉijara ili donis lekciojn al la fornego-funkciigantoj.

La konstruado de la blovfornego n-ro 8 estis vere laboro fare de la tuta nacio. Laboristoj venis el ĉiuj partoj de la lando por helpi en la konstruado. Pli ol 170 fabrikejoj en dek ok urboj, inkluzive de Ŝanhajo kaj Ŝenjang, Tienzino kaj Tajjuan, plenu-

mis mendojn pri ekipajo de la Fera-ŝtala Kompanio de Anŝan. Multe el tio estis neniam antaŭe produktita en Ĉinio.

Laborkonkurso

Septembro, 1952, estis notinda monato en la konstruado. Le Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj estis okazonta en Pekino kaj Oktobro 1-a, la Nacia Tago, estis venonta. La vetero estis pluva sed ŝvitige varmega. Tio forkonsumis la energion de tiuj pene laborantaj meze de sunbakita metalo kaj energia konstruado. Tamen ĉiu laboristo volonte partoprenis la laborkonkurson sub la slogano de "Por paco!" kaj "Tributo al Prezidanto Maŭ!"

Projekto defiis projekton, grupo defiis grupon kaj individuoj klopodis por plenumi produkt-garantion antaŭ templimo. La konstru-loko kie starigis la ruĝaj standardoj de la konkurs-gajnintoj, estis sceno de plej intensa aktiveco. Je diversaj altecoj sur la konstru-trabaro ĉirkaŭ la fornego-turo pli ol 800 laboristoj plene sin okupis pri sia laboro. Materialoj seninterrompe fluis al ili. Labor-vicoj sekvas unu la alian tiel precize kiel la horloĝo. Laboro estis aranĝita laŭ horo. La laboristoj ĉe ĉiu stadio de la konstru-laboro transdonis sian finitan laboron al la laboristoj ĉe la sekvanta stadio en bonorda procesio. Se unu grupo ne sukcesus plenumi sian taskon, la laboro de ĉiuj aliaj grupoj estus influita. Sed la organizado perfekte funkciis kaj ĉio iris efike kaj glate.

La progreso de la laboro pli kaj pli vigligis. Tiam Su Meng-lan, gvidanto de iu vinkvisto-grupo, fariĝis konata tra la labor-loko. Dum multaj tagoj lia grupo plenumis kaj superplenumis sian planon malgraŭ pluvo kaj varmego. Kiam la suno brilis tra la pluvo, varmo kun vaporo envolvis la vinkvistojn kiuj laboris interne de la varmega blovforno enmartelante brul-varmegajn vinktojn meze de la fumo de koakso-fajro. Por igi ilin pli komfortaj, konstru-trabarlaboristoj sub sia gvidanto Ŝang Ĉeng-li fiksis grandajn tend-tolojn super iliaj labor-lokoj 35 metrojn super la tero. Poste ili reiris kaj intensigis sian propran laboron por kovri la tempon kiun ili uzis por tiu kamaradeca ago.

Su Meng-lan estis tre aktiva kaj eltrovema kaj ne ŝatis ripozon. La ĉefo de la konstru-laboro ordonis lin iri hejmen. Li iris sed baldaŭ revenis kaj denove laboris. "Kiel mi povas ripozi? Mi ja ne povas dum la laboro progresas!" Dum nokto li ne povis dormi. Tamen li ne aspektis laca. Li gvidis sian grupon plenumi sian laboron longe antaŭ la difinita tempo.

Ĉies spriteco pliakriĝis dum tiu ĉi septembra konkurs-movado. Laboristoj sur la labor-loko eltrovis dril-maŝinon kiu altigis la laborefikecon dek ses kaj duonan oblojn. Pli ol 250 raciigaj proponoj estis prezentitaj. Tridek sep eltrovoj estis utiligitaj. Ĉi tiuj ŝparis milojn da milionoj da juanoj por la ŝtato, kaj 730 laboristoj ricevis premiojn dum tiu ĉi ruĝ-flaga konkurso. Ĉiu laboro estis farita antaŭ la fiksita dato kaj la monata plano estis superplenumita je 13.8 procentoj.

Finfina "Subit-atako"

Kun la komenco de la jaro, raportoj pri fina sukceso alvenis unu post alia. La koakso-fornoj

ekfunkciis en januaro. Poste la kemi-fabrikejoj komencis funkcii kaj la fortega turbino-blovilo, kiu provizas la blovon, estis provata por la unua fojo. Sed ĉe tiu ĉi fina stadio, Sovetia gaso-specialisto, post inspektado, elmontris neperfektaĵon, en la baza arango de la tubaro: la planistoj "zorgas la estantecon, neglektas la estontecon". Li rimarkigis ke en la sekvantaj kelkaj jaroj pli da blovfornoj kaj multaj aliaj grandaj fabrikejoj estos aldonataj al Anŝan. Do la arango de fabrikejoj kaj instalaĵoj devas ne nur solvi problemojn de la estanta stadio sed ankaŭ prizorgi la estontan disvolvigon. Li sugestis ke la gas-tubaro devas esti iom translokigata, por ke la estontaj konstruantoj ne trovu ekstran malfacilon kaj la fand-forno n-ro 8 ne interrompu produktadon dum la pli novaj blovfornoj kaj fabrikejoj estos konstruataj.

La dato de la funkciado de la tuta konstruaĵo estis jam fiksita. Oni kalkulis ke restis nur dek du tagoj por reformi la tubaron. Sed tiu periodo inkluzivis tritagan libertempon por la Printempa Festo. Ĝi estas granda festo en Ĉinio kaj multaj laboristoj jam mendis veturbiletojn por iri hejmen kaj aĉetis donacojn por siaj familianoj. Tamen, kiam la laboristoj aŭdis ke tiu ĉi laboro devas esti farata kaj ke oni postulas volontulojn, ili ĉion flanken metis. La nombro de laboristoj sur la labor-loko dum la Printempa Festo superis la originalan takson.

Denove Su Meng-lan troviĝis tie, laborante senripoze tage kaj nokte. Li ne klarigis sian ĉeeston pretekstante sendormecon. "La fornego estas mia hejmo," li diris. "Kiam la laboro komenciĝis, mi diris al mia filo ke li ne serĉu min ĝis mia laboro ĉi tie estos finita." Tion li parolis ja ankaŭ por la aliaj laboristoj.

"Subit-atako" laboro daŭris por sep tagoj kaj noktoj inkluzive la diritan libertempon malgraŭ neĝo. Por kuraĝigi la laboristojn, la kultur-sekcio disaŭdigis kantojn kaj *kuaĵ ban*, rapid-ritmajn kanzonojn, per speciale starigitaj laŭtparoliloj.

Dum la laboro pri la fornego proksimiĝis al la fino, ekscito sur la labor-loko pli kaj pli levigis.

La lasta paŝo estis ke iu Sovetia elektra specialisto zorgeme ekzamenis, provis kaj faris finfinan alĝustigon pri la elektraj instalaĵoj. Dum li laboris, li klarigis ĉiun paŝon de la procedo al la rilataj laboristoj kaj teknikistoj. Regula, sistema studo daŭris ĝis la lasta minuto. Apenaŭ ripozante en du tagoj kaj unu nokto, tiu ĉi diligentema specialisto estis finfine kontentigita.

Ĉe simpla ceremonio, la blovforno n-ro 8 estis funkciigita. Oni manipulis la komutilojn. Ruĝa lumo de montriloj anoncis la komencon de produktado kaj la varmega blovo sin ĵetis mugante en la fornego.

Ripetinte multfoje tiun procedon, la laboristoj ĉe la fornego perfekte ĝin plenumis. Ĉiu sciis ke li staris ĉe posteno de granda honoro.

Vulkan, dio de greka mitologio, estis konata pro sia lerteco pri metal-fandado. Sed nun, novaj legendoj estas kreataj. La homaro jam mastras la scienccon de metalurgio. Hodiaŭ, la antikva dio devas respekti tiujn kiuj superas lin en arto—kiel la talentaj kaj diligentaj konstruistoj de la blovforno n-ro 8 kaj la rekord-rompantoj edukitaj en progresinta Sovetia tekniko ĉe Anŝan en nova Ĉinio.

Mi Amas Miajn Infanojn

Taŭ Ŝu-fan

Mi estas 53-jara elementlerneja instruistino, kiu jam servis en ĉi tiu profesio dum 32 jaroj, kaj nun mi estas la vic-estro de la Dua Dependa Elementlernejo de la Pekina Instruista Universitato. Mia hararo jam griziĝis kaj miaj okuloj nebuliĝis, tamen nun mi fariĝis pli entuziasma kaj pli energia en mia laboro, ol kiam mi estis en juneco.



S-ino Taŭ estas ĉiam preta helpi al la gelernantoj. Jen ŝi parolas al ili pri la kurantaj aferoj.

El miaj lernintoj bon-efike kaj utile servantaj la socion, iuj nun jam atingis la agon de ĉirkaŭ 40 jaroj, kaj miaj lernantoj nun ankoraŭ lernantaj ĉe mi estas nur 7-8-jaraj. Ĉiutage, kiam mi alvenas la lernejon, miaj infanoj ameme alkrias: "Majstrino Taŭ! Majstrino Taŭ!" etendante al mi siajn manetojn kaj rigardante min per nigraj brilaj okuloj, kvazaŭ bonvenigante karulon post longa forestado. Tiuj, kiuj estis diplomitaj kaj estas nun laborantaj en diversaj fakoj, ofte venas al la lernejo por viziti siajn pasintajn geinstruistojn. Ĉio ĉi tio donadas al mi plezurojn kaj forton.

Mia lernejo multe pliboniĝis kaj ŝanĝiĝis depost liberiĝo. Dum la kvar jaroj, la klasoj plimultiĝis de 18 ĝis 25, kaj la monrimedoj plimultiĝis sepoble, la biblioteko nove ricevis pli ol 5,000 ekzemplerojn da libroj, kaj krome, aldoniĝis 5 pianoj kaj pli ol 2,000 sciencaj instrumentoj kaj biologiaj specimenoj. Tia disvolviĝo estas ekster niaj pasintaj revoj.

Nova Karaktero kaj Nova Virto de Infanoj

Tamen la pli granda progreso elmontriĝas en la infanoj mem. Tiuj ĉi geknaboj, aĝantaj je 12-13 jaroj, kvazaŭ grenkreskajoj post printempa pluvo, preskaŭ ĉiutage impresas vin per sia kreskado kaj progreso,

sentigas vin pri ia nobla virto kaj karaktero, kiuj, sub la influo de la nova socio kaj la lerneja edukado, ĝermas kaj maturiĝas tagon post tago.

La por mi plej neforgesebla epizodo okazis en oktobro lastjare, kiam la infanoj eksciis, ke la reprezentantoj de la Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj baldaŭ vizitos nian lernejon. Ili ĉiuj tiel ĝojegis, ke unu al la alia ili transdiris la novaĵon, ili zorgeme ankoraŭfoje balais la jam ĉiam puran lernejan ĝardenon. Kiel ardan bonvenigon ili donis al la reprezentantoj, kiam tiuj alvenis! Iu knabo, nomiĝanta Ŝjaŭ Hŭang, eĉ sin kaŝis en la klasĉambro kaj atendis ĝis kiam la reprezentantoj estis forirontaj, tiam li aperis kaj donacis al unu el la reprezentantoj sian koramatan medalon. Kiel ili arde amas pacon, amas la homojn kiuj luktas por la afero de paco!

La infanoj, en siaj pensoj, jam konscias pri la amindeco de la liberigita Ĉinio, kaj tial ili multe interesiĝas pri la gravaj okazaĵoj enlandaj kaj internaciaj. Dum libertempo ekster la kursoj, oni tre ofte povas vidi tian scenon: infanoj de malsuperaj klasoj, kun la gazeto "La Junaj Geknaboj" en la manoj, insiste petegas la instruist(in)ojn aŭ iujn superklasajn lernantojn: "Klarigu ankoraŭ unu paragrafon, nur unu, mi petas!"

Kolektivismo kaj spirito de interhelpo jam profunde enradikiĝis en la menso de la infanoj. Ili scias ke objekto apartenanta al la publiko devas esti zorgeme amata kaj protektata, kaj ili volonte donas siajn proprajn amatajn ludilojn, por ke ĉiuj kune ludu. Koncerne lernadon, ili ne nur klopodas mem akiri bonan rezulton, sed ili, ĉiu laŭ sia kapablo, interhelpas unu la alian, por ke ĉiuj kune progresu samtakte. Tial, la rezultato universale altiĝis. Tiun ĉi semestron, el la 1,100 lernantoj en la tuta lernejo, troviĝas nur 12 lernantoj kiuj ne sukcese trapasis la ekzamenon, en 15 klasoj ĉiuj trapasis, kaj la lernantoj en la sesajara klaso B eĉ atingis tian bonan rezulton en ses kursoj, ke neniu el ili gajnis malpli ol 4 poentojn.

Respekto al la Individueco de Infanoj

La ĝermado kaj kreskado de la novaj karaktero kaj virtoj de la infanoj neniel estas la sekvo de ia ajna deviga modeligo; sed male, ili ja estas la rezultato de la penoj faritaj de ni pedagogoj, kiuj alte taksas kaj taktike flegadas la individuecon de infanoj. Tiu punkto plej klare evidentiĝas en la progreso de la sesajara klaso B.

La sesajara klaso B estis nove fondita en la aŭtuno de 1951. La lernantoj en tiu klaso devenis de diversaj klasoj, inter ili estis kelkaj eksterordinare petolemaj infanoj kiuj tre amis fabriki fantaziajn petolemajojn por okazigi konfuzon aŭ malordon en la klasĉambro. Ofte dum leciono, apenaŭ la instruistino legis la unuan frazon, ili ŝerce sekvis per la dua. Iu infano eĉ malice petolis ĝis tia grado, ke li kunligis per skarpo siajn kruron al la tablo, kaj, respondante de-

mandon de la instruistino, li ŝajnis falon pro la starigo, tiel igante la klason ridegi.

La klas-direktantino, Zang Ŝou-pu, estas nova diplomito el la Pekina Instruista Universitato. Ŝi ne senkuragiĝis pro tio, nek ĉi timigis la infanojn per puno. Ŝi multe penis por ilin kompreni, kaj patrine prizorgis ilin, por tiel starigi la korigitecon inter si mem kaj la infanoj. Ŝi ankaŭ bone direktis la junajn pionirojn, el kiuj ŝi eltrovis iujn bonajn lernantojn, starigante ilin kiel imitendajn ekzemplojn kaj gvidajn elementojn por la tuta klaso, kaj sekve, memkonscia disciplinemo kaj la kolektivisma interhelpemo kaj reciproka amikeco inter la infanoj iom post iom kultiĝis.

Ŝi perdis neniun okazon doni al la infanoj bonajn lecionojn per vivecaj faktoj. La 1-an de oktobro, 1951, Liŭ Mej-jun, knabineto en tiu klaso, supreniris la Tjan'an-pordegon por prezenti al Prezidanto Maŭ florbukedon dum la granda parado de la Nacia Tago; post tio, instruistino Zang postulis, ke ŝi faru raporton antaŭ la klaso pri tiu ĉi okazo kaj pri sia tiama sento. Kiam la knabineto rakontis, ke Prezidanto Maŭ faras komplimentojn al ili ĉiuj, la tuta klaso ekzaltiĝis. Zang senprokraste kaptis la okazon, dirante al la infanoj ke tiu gloro ne nur apartenas al Liŭ Mej-jun sola, sed ĝi estas komuna gloro de la tuta klaso, kaj ke ili devas multe pli bone peni, por ne malesperigi Prezidanton Maŭ. Emociiĝinte pro tiu ĉi parolo, la infanoj, unu post la alia, starigis antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ, kaj ĵuris ke ili nepre bone ekzercos siajn korpojn, bone ellernos la lecionojn, kaj bone observados la disciplinon.

La sesajara klaso B estas nun la plej bona klaso en la tuta lernejo. Nur du el la klasanoj faris malpli rapidan progreson; tamen ili, per la helpo de la samklasanoj, ankaŭ glore "portis la ruĝan koltukon" je la ĉijara Junio-Unua (la Infantago). Ili ne nur interhelpas inter si mem en lernado kaj vivado, sed ankaŭ helpas la samlernejanojn de aliaj klasoj. Oni ofte vidas ilin rakontantaj historietojn al infanoj de malsuperaj klasoj. En la patriota higiena kampanjo ili helpas siajn gefratetojn balai iliajn klasĉambrojn. Instruisto Ĉen, mia malnova kolego, foje diris: "Dum mia longa instruista kariero de 30 jaroj, mi ja nur konstatis, kiel ofte la infanoj de pli superaj klasoj turmentas tiujn de la malsuperaj klasoj, kaj kiel ofte la lastaj denuncas al la instruistoj pro tiuj kvereloj; kaj nun en la infanoj mi vidas la belan perspektivon de nia nova Ĉinio!"

Alte Estimataj Popolaj Edukantoj

Travivante tiujn ĉi feliĉajn tagojn, mi ne povas ne rememori la mizeran vivon antaŭ liberigo, precipe la suferadon kaŭzitan de la reakcia Kuomintanga regado kiu revenis post la ok-jara japana kruela okupado. Tiam la varprezoj ĉiutage suprensaltadis, kaj la instruistoj, same kiel la lernantoj, baraktis en malsato. Ĉiumatene kiam okazis la "matenkunveno" sur la sporta placo, pli ol dek lernantoj svenis post kvaron-horo. Kaj ankaŭ mi mem svenis kelkfoje ĉe le estrado en la klasĉambro. La organizaĵo de progresemaj instruistoj ne kuraĝis publike agadi; ekzistis nenia garantio al ilia profesio. Tial ili nur fuĝe plenumis sian laboron, neniom konsiante sian respondecon. Ili ofte korpe punis la senkulpajn infanojn pro sia malbona humoro. Se okazis ke la instruisto forestis pro mal-

sano, la infanoj prenis tion kiel "bonan novaĵon" kaj bruege petolaĉis.

La muro inter la instruistoj kaj la lernantoj jam estis forlavita de la ondegoj de la tajdo novepoka. Nun la infanoj nin estimas, la socio nin respektas, kaj la popola registaro nin prizorgas kaj garantias al ni la laboron. Nia salajro estas sufiĉa por vivteni 4-5 familianojn. Al tiuj, kiuj havas pli multe da familianoj por vivteni, la registaro donas subvencion laŭ kape. Ni ĝuas "publikan kuracadon", okaze de malsano, la registaro pagas por ni la kostojn de kuracado kaj la labor-anstataŭanto estas pagata per la lerneja kaso. Por akuŝo oni havas 56-tagan forpermeson, ricevante sian plenan salajron. Unu el miaj kolegoj,



Meteorologia observatorio de la gelernantoj en la dependa lernejo.

Gaŭ Ĝing-ĝao, ĉe sia eksigo pro maljuneco, ricevadas 65 procentojn de sia salajro kiel pension. Alia, U Ŝu-jun, havis dunaskitojn antaŭ nelonge, kaj tuj ricevis 150 kilogramojn da rizo kiel subvencion. Ŝi emocie rimarkis: "La popola registaro ĉirkaŭas nin per favoro. Tio ĉi estas absoluta neeblo en la pasinteco."

Ni ekhavas nian propran organizon—sindikato de instruistoj. La sindikato direktas nin en studo, en plibonigo de nia labormaniero, kaj, entreprenante por nia bonstato multajn aferojn kiaj infanvartejoj ktp., helpas nin solvi la malfacilojn en ĉiutaga vivo.

Ke la instruistoj estas malestimataj kaj ignorataj, jam estas afero historia. Mi mem kiu estas nur ordinara elementlerneja instruistino, havis la gloron esti asignita ĉeesti la Internacian Konferencon por Infano-Protekto kiu okazis lastjare en Vieno, kaj ĉijare mi elektigis reprezentanto por la Dua Tutlanda Konferenco de Virinoj. Ĉio ĉi tio estas ekster nia pasinta sonĝo.

Mi arde amas miajn infanojn. Mi arde amas mian laboron. Mi dediĉos mian tutan energion al la nobla afero eduki la junan generacion. Mi kredas ke mia laboro kontribuas al la konstruado de nia patru-lando kaj al la afero de mondpaco.

La Sepa Tutĉinia Kongreso de Sindikatoj

Dum dek sinsekvaj tagoj ekde la 2-a ĝis 11-a de majo, en la grandioza palaco halo Hŭaj-ĵen, en Pekino, kunsidis la 7-a Tutĉinia Kongreso de Sindikatoj.

La Kongreson ĉeestis entute 813 delegitoj, reprezentantaj la 10,200,000 sindikatanojn de la tuta lando. Inter la delegitoj krom Han-oj, troviĝis ses aliaj nacioj. En tiu ĉi Kongreso, ili ĉiuj esprimis la decidemon, ke ili nepre luktos por la plenumado de la unua kvinjar-plano, por la industriigo de Ĉinio kaj por la paŝo-post-paŝa transiĝo al socialismo.

Invititaj ĉeesti la Kongreson estis la delegacio de la Monda Federacio de Sindikatoj, la delegitoj el 20 landoj de Eŭropo, Azio, Aŭstralio kaj Afriko, ktp. entute 105 personoj.

La unuan tagon de la Kongreso, kamarado Liŭ Saŭ-ĉi, Sekretario de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, parolis en la nomo de la Ĉina Kompartio. Montrinte la taskojn por la ĉina laborista klaso dum la grandskala ekonomia konstruado, kamarado Liŭ akcente diris: "La ĉina laborista klaso, krom surŝultrigi la suprediritajn neeviteblajn taskojn enlande, devas ankaŭ batali por la solidareco inter la laborista klaso de la tuta mondo, ĝi devas, sub la gvidado de la Monda Federacio de Sindikatoj, batali kune kun la laborista klaso de ĉiuj landoj kaj la progresema homaro por la defendo de mondopaco kaj sekureco."

Sekvante parolis Louis Saillant, Ĉefsekretario de la Monda Federacio de Sindikatoj, salutante la Kongreson kaj la ĉinan laboristan klason en la nomo de la 80,000,000 laboristoj kiuj unuigas sub la standardo de la M.F.S.

Li elmontris, ke la sindikatoj povas ludi specialan rolon en siaj respektivaj landoj, en kapitalistaj, koloniaj kaj duonkoloniaj landoj, lukti por ekonomia politiko baziĝanta sur vasta komercaĵo-interŝanĝo, por tiel kontraŭi la ne-kunlaborecon en ekonomio kiun la imperiistoj nun praktikas. Goroŝkin, ĉefo de la Sovetunia delegacio, emfazis: "La alianco kaj amikeco inter la grandaj ĉina kaj Sovetia popoloj estas elstare signifoplena en la luktado por mondopaco, demokratio kaj progreso." Al ĉiuj ĉi paroladoj la tuta halo tondre aplaŭdis.

Post du tagoj da ĝenerala kunsido, la Kongreso iris en grupdiskutojn. Dum la ĝenerala kunsido, Laj Ĵo-ju, Ĉef-sekretario de la Tutĉinia Federacio de Sindikatoj, faris raporton, kaj ankaŭ parolis ĉe la Kongreso multaj fremdlandaj delegitoj, kaj multaj sindikataj reprezentantoj kaj labor-modeloj el la diversaj regionoj de la lando. En sia raporto Laj Ĵo-ju donis ĝustan takson al la rezultatoj akiritaj dum la pasintaj jaroj depost la 6-a Kongreso en 1948, resumis la pasintajn spertojn kaj elmontris la taskojn kaj gvidajn principojn de sindikatoj en la epoko de ekonomia konstruado.

La Kongreso elektis novan gvidan organizon por la sindikatoj de la tuta lando—nova Plenuma Komitato de la Tutĉinia Federacio de Sindikatoj (kiu konsistas el 99 membroj, kun Laj Ĵo-ju kiel la prezidanto). Salutletoj al Prezidanto Maŭ, al la Ĉinaj Volontuloj en Koreio, kaj al la Monda Federacio de Sindikatoj estis unuanime aprobitaj en la Kongreso.

Tiel fermiĝis la historia kunveno, kiu simbolas solidarecon kaj progreson.

Survoje al Kinejo

(daŭrigo de p. 143)

"Ne, neeble, mi iros hodiaŭ kun mia frato al la parko. Jen estas tiom da kunlernantoj, kial la elekto ĝuste falas sur min? Ŝi iru al la aliaj kamaradoj kaj parolu afable kun ili. Oni certe konsentos."

La dua infano respondas rapide:

"Vi volas diri: 'Kamaradoj, hodiaŭ mi iros ludi kaj mi iros vidi kolorfilmon, tial mankas al mi tempo por servi al la popolo. Bonvolu servi tiun ĉi fojon anstataŭ mi. Vi nepre ne iru al la kinejo aŭ promenu kun via frato en la parko. Vi devas bone tion fari por mi! Mi jam lasas ĝin al vi! Jen estas via opinio.'"

"O! Mi ne povas argumenti kun vi. Agu kiel plaĉas al vi! Finfine Hunjo estas ja sola ĉi tie kaj neniuj vidas kion ŝi faras. Se ŝi farus malbone, oni ne deprenos de ŝi poentojn pro ŝia konduto, se bone, ŝi ankaŭ ne ricevos premion..."

Nun multe da infanoj krias unuvoĉe kontraŭ li.

"Ha, vi ne indas la titolon de juna pioniro! Direktoro Ĉen diris al ni: 'Ĉe se neniuj estas apude,

vi devas fari ĉion laŭ la devo de juna pioniro kaj labori bone ĝis la fino, kvazaŭ vi estus observata de dek okuloj kaj alcelata de dek fingroj.' Nia Hunjo estas tia infano."

Hunjo pensis:

"Prave, mi estas tia infano. Mi nepre trovu Kamaradinon Ŭang Fen antaŭ la deka!"

* * *

Sekve ankaŭ ĉifoje Hunjo ne sukcesis vidi "La Malgrandan Gardeniston."

Sed Hunjo estas tre ĝoja, ĉar ŝi fine trovis Kamaradinon Ŭang Fen—ja iu onjo, eĉ pli aĝa ol panjo.


Okazis tiamaniere. Hunjo ekzamenis la notlibron atente kaj vidis tie kelkajn adresojn. Ŝi provis la plej proksiman. Neniu hejme. Do ŝi turnis sin al alia, tie oni telefonis al multaj lokoj por serĉi Onjon Ŭang Fen kaj fine sukcesis. Onjo Ŭang Fen alvenis. Ŝi varme kaj intime premis la manetojn de Hunjo kaj ne sciis kiel esprimi sian dankemon.

"Amiketo, vi ankoraŭ ne diris al mi vian nomon."

"Ano de la Korpuso de Junaj Pioniroj," respondis Hunjo.



Li Ŝaŭ-ĉi gratulas la Kongreson en la nomo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio.



La Kongreso solene malfermiĝis en Hŭajjen-halo, kie proklamiĝis fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio, 1949.



Louis Saillant, ĝenerala sekretario de la Monda Federacio de Sindikatoj, salutas la Kongreson.

La Sepa Tutĉinia Kongreso de Sindikatoj

okazinta de la 2-a ĝis la 11-a de majo
markis novan stacion en la historio
de la ĉina laborista movado.

Sindikataj delegitoj el Sovetunio prezentas al la Kongreso grandan ruĝan standardon kun brodita portreto de Stalin kaj la surskribaĵoj: "Vivu la Nedetruibla Amikeco inter la Sovetia kaj Ĉina Popoloj" kaj "Unuiĝu Laboristoj de Ĉiuj Landoj".





La pli ol cent mil interhelpaj infanzorgaj grupoj en la vilaĝoj donas bonan zorgon al la infanoj dum iliaj patrinoj partoprenas produktadon.



Pekinaj junaj pioniroj en la granda den-
de M




Regula ekzamenado pri la sanstato de la infanoj de Pekina infanvartejo.

INFAN EN POPO

Malsato, frosto, pesto, mor-
sorto por la infanoj de la
Ĉinio! Sed nun, la burĝonoj
pli bonan prizorgon pri ilia
de la ĝenerala plia

Atenta studado pri la maiz-
plantaĵoj propramane plantitaj
donas al la lernantino intereson
pri agronomio.






Stracio por paco kaj demokratio je la Unua
1953.



Post plezura ekskurso la junpioniraj trumpetistoj kun-
vokas siajn gekamaradojn por hejmeniro.

ANOJ LA ĈINIO

to, analfabeteco—kiel terura
laboranta popolo en malnova
de la ĉina popolo ĝuas ĉiam
rpa kaj spirita disvolvo sekve
ĝo de la vivnivelo.



Fabrikoj, minejoj kaj diversaj ekspozicioj estas
vivaj lernejoj por la ĉinaj infanoj. Lernantoj
vizitas la Pekinan Maŝinfabrikon.



Amo al la patrio, amo al la
popolo, amo al laboro, amo al
scienco, amo al publika pro-
prajo estas fervore prikantataj
de la ĉinaj infanoj.



ite de la minacoj de la usonanoj, korea militkaptito venas kun kepo de la Korea Popola Armeo surkape kaj kun la korea naciflago enmane.



Rememorante pri la kruelaj turmentoj en la Usonaj militkaptitejoj, la revenantaj ĉinaj volontuloj ne plu povas sin deteni de ploro antaŭ la akceptantaj kamaradoj.



antaŭ sia foriro, Usonaj kaptitoj esprimas sian dankon por la humanisma traktado de la korea-ĉinaj militkaptitejoj.

La Intersaĝo de Malsanaj kaj Vunditaj Militkaptitoj

Donis novan ateston pri la falseco de la Usona "humanismo" kaj pri la vera humanisma traktado al la militkaptitoj fare de la korea-ĉinaj fortoj.

Ĝoja celebrazo pri la hejmeniro de la Usonaj kaj alilandaj malsanaj kaj vunditaj militkaptitoj estis aranĝita de la korea-ĉinaj aŭtoritatoj.



Novtipa Elektrejo

Daj Jan-njan

En Nordorienta Ĉinio, pli ol cent kilometrojn for de Ŝenjang (Mukdeno) situas la urbo Fusin kie nun starigis novtipa hejtpova elektrejo—Fusin-elektrejo, kiu liveras povon al fabrikoj kaj lumon al urboj. Tio estas plua ekzemplo de la brilaj sukcesoj en la ekonomia konstruado en nia lando.

En tiu ĉi elektrejo staras kelkaj altaj kaj dikaj malvarmigaj turoj kaj grandaj fumtuboj el kiuj ellasiĝadas griza fumo en la altan aeron. Kompleksaj retsimilaj elektraĵoj dratoj etendiĝas al diversaj flankoj. La plej admirinda estas la moderna ekipaĵo en tiu ĉi elektrejo. La tuta produkta procedo estas plenumata per plej novaj aŭtomataj instalaĵoj. La kaldronejoj de Fusin-elektrejo neniam bezonas purigon. Troviĝas en la elektrejo kompleta ekipaĵo por moligi la akvon. Post scienca procedo la akvo fariĝas norme pura kaj ĝi tute ne estigas kalkan kruston en la kaldronego.

Multaj sekurigaj instalaĵoj garantias al la maŝinoj daŭran sendanĝeran funkciadon eĉ dum akcidento. La kaldronego en la elektrejo havas tiel eksterordinare altan efikecon, ke se la liverado de akvo interrompiĝus dum tridek sekundoj, la akvo en la kaldronego tute forvaporigis pro bolado kaj tiam la granda kaldronego eksplodiĝus. Kiel neimageble mallonga la daŭro de tridek sekundoj estas! Se la akvopumpilo iel malfunkcios, oni tute ne povos senprokraste ĝin reordigi. Sed tiuokaze, alia aŭtomata akvopumpilo tuj funkcios kaj liveros akvon anstataŭ la unua kaj la kaldronego daŭre funkcios glate.

Sur ĉiu ĉenero de la produktado troviĝas multaj aŭtomataj registriroj kiuj registras de tempo al tempo la staton de la produktado. La sistemo de aŭtomataj signaloj transdonas facile, rapide kaj klare la gvidojn pri la produktado.

La aŭtomatigo de la maŝinoj ebligas la malpliigon de la maŝin-direktantoj. En la laborejo de turbino troviĝas pli ol dek ĉefaj kaj helpaj maŝinoj, sed ĝenerale ilin direktas nur kvin personoj.

Alia trajto de la novaj instalaĵoj estas la perfekta sekuriga aranĝo por la laborantoj. Super ĉiuj partoj de la maŝinoj, movantaj aŭ en kiuj fluas elektra kurento, estas metitaj protektaj kovriloj aŭ protektaj retoj por ke la direktantoj ne povu ilin tuŝi. Plie, sur la tero malsupre de ĉiu malalttensia komutilo oni metas kaŭĉukan izoligan tapiŝon. Pro tio, eĉ se la komutilo hazarde difektiĝas kaj eligas elektron, la manipulantoj ne renkontas danĝeron. La ekstero de ĉiuj elektraĵoj estas konektataj kun la tero, sekve, se iu el ili difektiĝas, la laborantoj ne estos elektro-frapataj.

Oni komencis konstrui Fusin-elektrejon ekde decembro, 1951, kaj ĝi liveras elektran povon ekde la 21a de septembro, 1952. Tiu ĉi novtipa, moderna elektrejo povas stari fiere apud kiu ajn plej moderna elektrejo en la mondo. Kaj estas mirinde ke ĝi starigis

sur la tero de nova Ĉinio kiu fondiĝis nur antaŭ tri jaroj.

La naskiĝo de tiu ĉi novtipa elektrejo montras al ĉiuj la nekompareblan superecon de popoldemokratia soci-sistemo; ĝi montras al ĉiuj la talentan saĝecon kaj la grandan kreaŭ kapablon de la ĉina popolo.

Ni devas precipe mencii ke la naskiĝo de tiu ĉi elektrejo ne estas efektivebla sen la grandanima helpo de Sovetio.


La tuta ekipaĵo en tiu ĉi elektrejo estas la plej nova produktaĵo el Sovetio. Nia amiko havigis al ni la plej bonan kaj plej progresintan ekipaĵon. Jen ni rakontu nur pri la instalado de la nova filtrilo de la turbina generatoro:

En aŭgusto de la lasta jaro, Fusin-elektrejo estis ĉe la fino de la instalado. Ĝuste en tiu tempo, Bopolov kaj Aleksandro, Sovetiaj specialistoj helpantaj la instaladon, subite ricevis planon de la plej novtipa filtrilo de turbina generatoro, kiun sendis la Moskva Turbinofabriko. Krome, venis ankaŭ telegramo kiu sciigis ke tia progresinta sperto estas baldaŭ disvastigota en ĉiuj elektrejoj tra la tuta Sovetio, kaj ke ili volas ĝin rekomendi al la ĉina popolo. La Sovetiaj specialistoj laŭ la alsendita desegno faris senprokraste planon pri la reinstalado de la filtrilo. Tiam kelkaj ĉinaj kadroj pensis: "La Sovetiaj maŝinoj jam estas pli bonaj ol tiuj nun uzataj maŝinoj el la imperialistaj landoj. Kial do ni ankoraŭ bezonas la anstataŭigon?" Sed la Sovetia specialisto, Bopolov, diris: "La Sovetiaj maŝinoj estas ja la plej progresintaj en la mondo. Tamen se ni ne reformus la filtrilon laŭ la plej nova desegno, tiu ĉi turbina generatoro estus malpli progresinta ol tiu en Sovetio. Ĉar nia devo estas helpi Ĉinion konstrui per la plej progresinta tekniko, sekve ni volas fari la progresintan filtrilon ankoraŭ pli progresinta, por ke ĝi estu same progresinta kiel tiuj en Sovetio!"

Finfine, la filtrilo de la turbina generatoro estis reinstalita laŭ la nova plano. La nova filtrilo havas la avantaĝon ke ĝi povas filtri la lubrikoleon kun pli alta efikeco. Plie, oni povas de tempo al tempo forigi la feĉon de la lubrikoleo sen la bezono haltigi la generatoron kaj pro tio, la sekura funkciado de la ĉefa lagro de la turbina generatoro estas garantiata kaj la vivo de la generatoro estas multe plilongigita.

Ne nur Sovetio liveris al ni la plej progresintan maŝinon, sed ankaŭ la Sovetiaj specialistoj instruas la plej progresintan teknikon al la ĉinaj laboristoj kaj la administraj kadroj, por ke ili mem posedu la plej progresintan teknikon kaj povu mem administri tiun ĉi plej modernan elektrejon.

Dum la instalado de la maŝinoj la Sovetiaj specialistoj instruas la ĉinajn laboristojn pri multaj progresintaj metodoj por la instalado. Ekzemple, por instali la grandan kaldronegon kiu estas alta kiel



Angulo de Fusin-elektrejo

kvinetaĝa domo, laŭ la malnova metodo en Ĉinio, oni devas starigi la ŝtalplatojn kaj ilin kunigi pecon post peco. Tia metodo postulas multan laboron en alta loko, kio faras la laboron tre danĝera kaj malrapida. Sed la Sovetiaj specialistoj instruis jenan metodon por instalati la kaldronegon: unue, la tuto de la kaldronego estas dividata en kvar partojn kaj la ŝirmoplatoj, ŝtupetaro kaj balustrado estas fiksataj kiam la kvar partoj ankoraŭ kuŝas sur la tero; poste, la kvar partoj

estas starigataj kaj kunigataj formante tutan kaldronegon. Nur per tio oni povas ŝpari duonon de la tempo bezonata de la malnova metodo. Dum la instalado, la Sovetiaj specialistoj instruis al la ĉinaj laboristoj okdek naŭ progresintajn spertaĵojn.

La Sovetiaj specialistoj montras mirindan paciencon kaj zorgemon kiam ili instruas la ĉinajn laboristojn. Ili preparas lecionojn laŭ la kulturenivelo de la laboristoj. Ili donas al ili lecionojn en difinitaj tempoj. Ili klarigas ĉiun problemon ĝis la laboristoj fine ĝin perfekte komprenas. Tial ili ofte devas ripeti la klarigon por certa problemo ses aŭ sep fojojn. Krom la lecionoj la Sovetiaj specialistoj ankaŭ ofte gvidas la laboron por ke la laboristoj lernu el praktiko.

Por la unua fojo veldisto Ĝang Hung-seng veldis tiel grandan kaldronegon kiel ĉi tiun en Fusin-elektrejo. Plie, li neniam antaŭe vidis la Sovetian progresintan metodon de elektra veldo. Kiam li komencis veldi la unuan kaldronegon, la Sovetiaj specialistoj ĉiamaniere instruis al li la novan metodon ĝis kiam li atingis la saman nivelon de veldtekniko kiel Sovetiaj specialistoj. Kiam la dua kaldronego estis veldata, Ĝang Hung-seng jam memstare laboris per la Sovetia progresinta metodo de elektra veldo. Nun li fariĝis gvidanto de pli ol kvardek veldistoj, instruante la progresintan teknikon.

Sub la edukado de la Sovetiaj specialistoj, multaj laboristoj, kiuj funkciigis malnovan generatoron, kaj nove alvenintaj junaj lernantoj kaj kamparanoj, fariĝis progresintaj laboristoj funkciigantaj la novtipan elektrejon.

La novtipa giganta Fusin-elektrejo fiere staras sur la tero de nia lando, kaj servas por la grandskala ekonomia konstruado de nia patrio kaj por la plibonigo de la popola vivo en nia lando. Ĝi provizas dum la tuta jaro tiom da povo per kiu oni povas produkti 219,000,000 sakojn da faruno.

Impresoj pri Lhasa

Fang De

Ĝoja Majo

Trans la montaron, al Lhasa venas printempo. Denove estas majo. Antaŭ la pordo de Daĝaŭ-temple, meze de la urbo, la "princina saliko",¹ kiu simbolas la historian intiman rilaton inter la Tibeta kaj la Han-a popoloj, sin vestas en freŝa verdo. Florantaj pom-arboj, abrikoto-arboj kaj persiko-arboj bele ornamas la urbon Lhasa, donante la impreson de printempo en Suda Ĉinio.

Antaŭ du jaroj, ĝuste en tiu ĉi varmeta printempa monato kun bonodoro de floroj, la Tibeta popolo revenis al la granda familio de la nacioj en nia patrio, kaj komencis la novan kaj esperoplenan vivon.

Tiu ĉi urbo, situanta sur la altebenejo en la Meza Azio, estas plena je ĝojo. La ruĝa kvin-stela standardo de la Ĉina Popola Respubliko flirtas en la printempa zefiro. Geknaboj en brilkoloraj vestoj dancas kaj kantas sur la placo. En la arbara ĝardeno ekster la urbo promenadas bele vestitaj nobeloj, bele ornamitaj virinoj kun ombreletoj en siaj manoj, kaj ankaŭ lamaoj vestitaj en ruĝaj lanaj teksaĵoj. En la ĉirkaŭ-urbo

multaj urbanoj starigas tendojn, en kiuj ili drinkas kaj dancas kun siaj familianoj, ĝuante liberĉielan vivon.

Kiel la Urbo Aspektas

La loĝeja kvartalo de Lhasa estas en la nordorienta parto de la urbo, kie loĝas dudek naŭ mil loĝantoj. En la sudorienta parto de la urbo loĝas la nobeloj, oficiroj kaj riĉaj komercistoj. La Tibeta Loka Registaro sidas en la Daĝaŭ-temple, kiu estas ĉirkaŭita per larĝa strato, en la formo de kvadrato. Tiu estas la fame-konata Okangula Strato—la komerca kaj financa centro de Lhasa. Sur tiu ĉi strato estas butikoj posedataj de la Han-oj, Tibetanoj, mohametanoj, kaj ankaŭ de Nepalaj komercistoj, kiuj enmigris tien jam antaŭ longe.

Pasigu duontagon sur la Okangula Strato, kaj vi jam konstatos la komercan prosperon de Lhasa. Homoj alvenas al Lhasa el ĉiuj anguloj: paŝtistoj vestitaj en pelto kun aroj da Tibetaj bovoj portantaj lanon aŭ kreon; kamparanoj kun grupoj da azenoj portantaj hordeon kaj brul-lignon; kaj ankaŭ tiuj kun aroj da muloj por-

tantaj teon, venanti de Sikang. Aĉetinte la bezonatajn necesojn, la paŝtistoj kaj kamparanoj, kontente kaj klakigante la vipojn, reiras al siaj hejmoj kun siaj ŝarĝbestoj.

La aspekto de tiu ĉi urbo ŝanĝiĝas ĉiutage. Oni estas konstruanta la unuan kinejon en la Tibeta historio, brut-seruman fabrikon kaj lernejon por kadroj. Multaj novaj domoj aperas sur la farmo "la Unua de Aŭgusto," kiu situas 4 kilometrojn de la urbo. Granda akvobarilo estas konstruata sur Lhasa-rivero, kaj en la kamparo aperis multaj irigaciaj foŝaĵoj.

Miloj da Tibetanoj, P.L.A.-anoj kaj teknikistoj plene sin okupas je laboro. Ĉiutage ekde mateno ĝis sunsubiro, oni vidas sur la ebenaĵo arojn da Tibetaj bovoj kaj azenoj, portantaj ŝtonon, kalkon aŭ sablon, sur la ŝoseoj kondukantaj al la urbo. La ledoboatoj en Lhasa-rivero fariĝas pli aferoplenaj pro la transportado de konstruaj materialoj.

Potala-Palaco

La ora tegmentpinto de Potala-palaco, kiu situas sur Potala-monto ne malproksime okcidente de la urbo, pompe brilas sub la suno. Tiu ĉi dektri-etaĝa grandioza konstruaĵo kun blanka muro estas la palaco kie la Dalaj-lamaoj tradicie loĝas. Dum la lastaj du jaroj tie okazis du gravaj historiaj eventoj.

En la vintro de 1951, je iu postnegra serena tago kiun li elektis kiel la plej bonaŭguran, la Dalaj-lamao akceptis en sia loĝa palaco Generalon Ĝang Ĝing-u, la reprezentanto de la Centra Popola Registaro, kaj Generalon Ĝang Ĝjao-hŭa, la komandanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo al Tibeto. Li ankaŭ invitis ilin kune kun multaj akompanantaj oficiroj rigardi kaj promeni tra la bela palaco. La gardantoj-lamaoj en ĉiu palacodomo faris preĝon por la vizitantoj. La du generaloj agente laŭ la Tibeta moro, prezentis en ĉiu palacodomo "hada"-on (peco da silkteksaĵo, kiun oni prezentas ĉe renkontiĝo kiel donacon por esprimi altrespekton).

Printempe de 1952, Panĉen Ngoertehni² revenis al Tibeto el Cinghaj. Je la 4-a horo p.t.m., la 28-an de aprilo, la Dalaj-lamao kaj Paĉen Ngoertehni—la du gvidantoj de Tibeto, surtroniĝis en la plej alta etaĝo de la Palaco, kaj konsultiĝis pri la plano por rekonstrui Tibeton. La fendo kaŭzita de la imperiistoj ekde 1923 inter la tibetanoj tiel nuligis. La multjara sopiro de la Tibeta popolo jam efektiviĝis. La 50,000 loĝantoj de la tuta urbo—lamaoj kaj laikoj—samvoĉe akklamis tiun feliĉan okazon. Forte sonis ilia kanto: "Amikiĝis Dalaj kaj Panĉen Ngoertehni, kiel feliĉa tempo al ni!"

La Elementa Lernejo

En la pejzaĝa loko en la nordokcidenta parto de la urbo situas la Elementa Lernejo de Lhasa. Ĝi fondiĝis je la 19-a de julio, lastjare, laŭ la soifa deziro de la Tibetanoj kaj per la helpo de la kulturaj laborantoj kiuj alvenis Tibeton. La lernantoj nombriĝas pli ol 600.

La lernejestro estas Sjuĝang Budao—la Vic-"Majstro en Sutro"³ de la Dalaj-lamao. El la 23 instruistoj 10 estas monaĥ-oficiroj, 10 estas laik-oficiroj, kaj 3 estas "Geŝi"-oj t.e. tiuj, kiuj estas eminentaj en la studo de sutro). La lingvo uzata en la lernolibroj kaj en instruado estas la Tibeta.


La lernejo estas entuziasme subtenata de la Dalaj-lamao kaj la vasta loĝantaro—ĉu monaĥoj, ĉu laikoj. La Dalaj-lamao eĉ donacis sian arbargardenon situantan proksime de la lernejo kaj 6,000 pat-ojn da arĝento al la lernejo.

Mi vizitis tiun lernejon je la Nacia Tago lastjare. Ĝi agrable kaj profunde impresis min. En la muzikĉambro iu knabino estas ludanta orgenon, dum aliaj geknaboj hore kantas laŭ la melodio. Sur la placo, la geknaboj estas farantaj diversajn sportojn. Mi pensas, ke tio estas nur la komenco de la feliĉa vivo por la Tibetaj infanoj.

Sano anstataŭ Malsano

Pli ol unu fojon mi aŭdis la diron de tibetanoj ke pasinte la ambaŭ bordoj de Lhasa-rivero ne estis belaj, sed tre strangaj lokoj. La fakto estas tia: antaŭ la liberiĝo en Lhasa ĉiujare superregis endemioj, kaj pro manko de kuracistoj kaj medicinaj rimedoj, tre ofte la familianoj portis la malsanulojn al la bordo de

Strato antaŭ Potala-palaco



La Dalaj-lamao (dekstre) kaj Panĉen Ngoertehni

Lhasa-rivero, kaj lasis ilin al la sorto. Se ili mortis, oni ĵetis la kadavrojn en la riveron.

Post sia alveno en septembro 1951, la Ĉina Popola Liberiga Armeo gvidis la loĝantojn batali kontraŭ la morto. Slimbaritaj riveroj estis dragitaj, multjare akumulitaj ruboj estis forigitaj, kaj publikaj necesejoj estis konstruitaj. La milit-kuracistoj de PLA inokulis la loĝantojn kontraŭ diversaj epidemioj senpage.

Se oni malsanas, li ne plu estas forlasita ĉe la bordo de Lhasa-rivero, sed ricevas senpagan kaj zorgan kuracadon, aŭ kuŝas en komforta malsanlito en la Popola Hospitalo. Ĉi tiu hospitalo alportas al la tibetanoj grandan feliĉon. Iu malsanulo de sifilisa artikito resaniĝis post kuracado. Li estis tiel ĝoja ke li dankis la kuracistojn per danco. Maljuna paŝtisto Cideng, kiu blindiĝis antaŭ longe, regajnis sian vidpovon post kuracado. Li dankeme premis la manon de la kuracisto kaj diris: "Miajn okulojn donis al mi Prezidanto Maŭ kaj vi!"

Juneca Maljunulo

Aŭaĉaĝu estas unu el la Tibetaj amikoj neforgeseblaj al mi.

Tiu ĉi sendenta, blankhara maljunulo estas famekonata poeto kaj historiisto en Tibeto. Dum la regado de la 13-a Dalaj-lamao (la nuna Dalaj-lamao estas la 14-a), li servis por 20 jaroj kiel "Kancin" (titolo de grava altranga monaĥ-oficiro ĉe la Dalaj-lamao, kies ofico estas prizorgi la sekretariajn laborojn laŭ la volo de la Dalaj-lamao. Nun li estas tibetlingva instruisto en la PLA, kaj ĝuas altan respekton. Li estas verkanta historion pri imperiisma invado al Tibeto por eduki la junan generacion.

Mi kaj du aliaj artistoj lin vizitis dufoje. Ĉiufoje li akceptis nin fervore. Li parolis al ni pri la Tibeta historio, vivece priskribante la ruzecon kaj kruelecon de la imperiistoj. Kaj poste li, rakontis al ni historiojn de la brava batalado de la tibetanoj kontraŭ la imperiista invado. Dum la elokventa parolado, tiu ĉi fervora patriota maljuna instruitulo emociiĝis, kaj

laŭte kantis: "Leviĝu! homoj kiuj ne volas esti sklavoj..." la Ĉina Nacia Himno, kiu ĉiam tiel kuraĝigas la ĉinan popolon al batalo por sendependeco kaj libereco. Kiam li parolis pri la de li propraokule vidata, ĉiam disvolviĝanta nova rilato inter la nacioj post la libertigo, kaj pri la ĉiam pli feliĉa vivo kiu alvenis al la tibetanoj, li denove ĝoje kantis la kantojn "Unuiĝo estas Forto" kaj "Oriente Ruĝas sun'", kiujn li lasttempe tradukis en la Tibetan lingvon.

Miaj kunuloj petis lian kritikon pri iu pentraĵo kiu prezentas la intiman unuiĝon inter la Dalaj-lamao kaj Panĉen Ngoertehni sub la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ. La maljunulo, por esprimi altan respekton laŭ la Tibeta etiketo, unue prenis la pentraĵon, levis ĝin super sian kapon, ceremonie preĝis, kaj fine li diris sian opinion.

Ĉiufoje kiam ni adiaŭis, li intime premis niajn manojn kaj diris: "Se troviĝus ĉanco diru al Prezidanto Maŭ ke mi, Aŭaĉaĝu, preĝas por lia longdaŭra sano."

Tio estas la vortoj, kiujn ni estas komisiitaj transdiri al Prezidanto Maŭ ne nur de Aŭaĉaĝu sola, sed ja ankaŭ de ĉiuj popoloj de la tuta Lhasa kaj la tuta Tibeto.

1 En la sepa jarcento, la ĉina imperiestro de Tang-dinastio edzinigis sian filinon, Princino Ŭen-ĉeng, al la Tibeta princo. Per tio la ekonomia kaj kultura interfluo inter Tibeto kaj la Patrio multe vigliĝis. Oni diras ke la saliko estis propramane plantita de Princino Ŭen-ĉeng.

2 Ambaŭ la Dalaj-lamao kaj Panĉen Ngoertehni (ankaŭ konata kiel la Panĉen-lamao) estas la estroj de la du sektoj de Lamaismo en Tibeto. Ĉar en Tibeto kaj religio kaj politiko estas en unu potenco, tial ili estas samtempe gvidantoj en politikaj aferoj. Estas tia kredo en Lamaismo, ke ĉiu Dalaj kaj Panĉen estas la reenkorpiĝulo de la antaŭa memo. La nuna Dalaj estas la dek-kvara kaj la Panĉen, la deka.

3 Sutro—budaisma sankta skribo.

Kaŝita Arttrezoro Malkovrita

—Skizo pri la Festo de Popolmuziko kaj Popoldancoj—

Jang Joŭ

La ĉi sube priskribita okazintaĵo estis senprecedenca en la ĉina historio. Pli ol tricent popolaj artistoj reprezentantaj dek naciojn—paŝtist-muzikistoj kun ĉevalkapaj kordinstrumentoj en siaj brakoj el la stepo de Interna Mongolio, Sinkiangaj kantodancistoj kun broditaj ĉapetoj uzbekaj, kamparan-dancistoj en blankaj roboj de la korea nacio el la Nordoriento, veteranaj kantistoj de montkantoj el la montaraj regionoj de la Sudokcidento, infanaj artistoj kun ruĝaj koltukoj el la tropika Hajnan-insulo, k. a.—venis de ĉiuj anguloj de la lando al Pekino, la popola ĉefurbo de la epoko de Maŭ Ze-tung. Partoprenante en la Unua Tutlanda Festo de Popolmuziko kaj Popoldanco aranĝita de la Ministerio de Kulturo de la Centra Popola Registaro, ili faris seninterrompe posttagmezajn

kaj vesperajn prezentadojn por ok tagoj komence de la 1-a de aprilo, 1953.

Tiuj ok tagoj estis tre altvaloraj en la arta historio de Ĉinio. Kiel longe kaŝitaj trezoroj malkovritaj kiujn oni prirakontas en legendoj, niaj popolmuziko kaj popoldancoj montris eksterordinare riĉan enhavon kaj mozaikan belecon. Sed nur post sistema kaj organizita elfosado estis akirita ĉi tiu rezultato.

En la komenco de ĉi tiu jaro, la Ministerio de Kulturo organizis kaj ekspedis ĉirkaŭ ducent famajn muzikolaborantojn kaj dancolaborantojn de Ĉinio, inkluzive de Daj Aj-ljan, Li Ling, Li Hŭan-ĝi, k. a., al diversaj lokoj tra la tuta lando por enketi kaj elfosi popolan arton. Dum pli ol unu monato, ili iradis de

grandaj urboj ĝis foraj montvilaĝoj, trapaŝante tra dudek ses provincoj kaj du aŭtonomaj regionoj kaj kontaktante kun sennombraj riĉaj artformoj kaŝitaj en la vivo de la popolo dum centoj da jaroj. Iufoje en ĉi vilaĝo de Kiangsi-provinco, ili rimarkis antikvan dancon ludatan de kamparanoj—*Tjaŭ-no*,* eble unu el la *Sorĉisto-dancoj* kiuj jam ekzistis en Ĉoŭ-dinastio antaŭ pli ol 3,000 jaroj.

Samtempe, en la unua tagdeko de marto, pli ol dudek provincoj kaj urboj okazigis sub la gvido de respektivaj kulturaj administrantaj organizoj festojn de popola arto. Sole tiun de Liaŭtung-provinco partoprenis ĉirkaŭ kvincent artistoj kaj en la prezentado ili revivigis multajn popolkantojn kaj baladojn kiuj jam ĉesis disvastiĝi antaŭ kvindek jaroj. En la festo de Pekino, la monaĥoj el naŭ monaĥejoj prezentis la muzikan heredaĵon de Tang-(618-906 p. K.) kaj Sung-(960-1276 p. K.) dinastioj konservatan en la monaĥejoj—la *Budaismaj Kantoj*.

En ĉiuj renkontigoj de popolaj artistoj estis luditaj pli ol cent zorgeme elektitaj, simplaj, sanaj, kaj de la granda popolamaso ŝatataj muzikaj kaj dancaj pecoj. Post la prezentado fare de la altnivelaj spertaj artistoj, tiuj artaj pecoj, kiuj elkreskis inter la popolamaso kaj transdoniĝis, disvolvigis kaj pliriĉiĝis de generacio al generacio, plene manifestis la karakterizaĵojn de nia popola arto.

Unu el la karakterizaĵoj estas la batalemo kaj kontraŭstaremo de la popolo kontraŭ subpremo kaj maluma regado. Prenu la de tutlanda popolo ŝatatan *Leonandan* kiel ekzemplon. Ĝi estis ludata de la popolaj artistoj el Hunan-provinco kaj prezentis la lukton de heroo kontraŭ leono. La leono, pro la supereco de la dancarto de la du dancistoj kiuj kune ludis la rolon, jen kuris tien kaj reen, jen saltis dekstren kaj maldekstren, kaj jen alte saltis al la bravulo, kun malfermegata, sangon soifanta buŝo, unuvorte, kiel reala sovaĝa besto furiozanta. Kaj la heroo sentime iris renkonte al la vivoriskanta lukto kun tia eksterordinara trankvileco, braveco kaj takto ke li finfine venkis la leonon, simbolante ke la subpremata kaj ekspluatata popolo finfine gajnis venkon super perforteco.

La sama temo estis priskribita ankaŭ en la *Danco de Herooj* de Kuangtung-provinco. Tiu danco priskribas la 108 popolajn heroojn en la fame konata rakonto: *Ĉiuj Homoj Estas Fratoj*. Portante mal-longajn armilojn sur siaj dorsoj kaj tenante bastonojn en siaj manoj, la herooj paŝis kaj dancis samtempe, farante necedeman kaj obstinan lukton kontraŭ la tiamaj regantoj. Krome, la *Spaddanco* de la korea nacio de la Nordoriento ankaŭ prezentis la saman heroan batalemo de kamparanoj kontraŭ bienuloj.

Spite kiel tiranaj la reakciaj regantoj estis, la popolamaso ĝemanta sub la peza subpremo de feŭdismo, havis plenan fidon pri la venko en la batalo por brila estonteco kaj feliĉa vivo. Tre multaj pecoj pritraktis ĉi tiun temon. Inter ili la plej elstara estis la *Oktona Harmonio* de Ŝansi-provinco kiun konsistigas ok muzikiloj: ŝeng**, ĝuan** tamtamo, tamburo, k. a. La *Oktona Harmonio* estas la plej ŝatata orkestro de la vasta kamparanaro de Ŝansi-provinco, kiun ili povas aŭskulti tage kaj nokte por kelkaj tagoj senlace. Sed en la malnova socio, tiaj elstaraj artistoj estis rigardataj kiel la plej malnoblaĵoj homoj kaj iliaj idoj malpermesataj de la reakciaj registaroj fariĝi ŝtatoficistoj aŭ komercistoj. La muzikpeco *La Triumfo* ludata ĉifoje estis dekomence en tiel viva takto kaj alta kadenco


ke ŝajnis al la aŭskultantoj ke ili vidus la proksimiĝantan, triumfe revenantan popolan armeon en siaj majestaj kolonoj kun brilaj flirtantaj flagoj, kaj aŭdus la tintojn de armiloj, kaj hufoprapojn kaj blekojn de ĉevaloj, kaj fine ili vidus la majeste marŝantan, triumfokanton kantantan armeon paŝantan sur la vojo plena de bruegoj de tamtamoj kaj tamburoj, bonvenigante de la huraantaj homamasoj de ambaŭflankoj de la vojo.

Alia karakterizaĵo de nia popola arto estas ke ĝi ĝuste, vivece, profunde kaj arte spegulas kaj per realismo traktas la tre abundajn agadojn de la popolo—vivo, amo kaj laboro. Muzikpecoj prezentantaj ĉi tiujn temojn okupis tre grandan proporcion en la tuta programo.

La Papiliokapta Danco de la Nordoriento kaj la *Paperdraka Danco* de Hunan-provinco estas ambaŭ dancoj kiuj priskribas amon de gejunuloj. La maljuna artisto, Li Ŭen-ĉing, plene esprimis la naivan, ĝojan animstaton de junulo kaptanta papilion sur floranta kampo en printempo. La *Paperdraka Danco* priskribas junulinon kiu flugigante paperdrakon en ĝardeno atendas la alvenon de sia amanto. Dum la dancado la 61-jara maljuna artisto, Ljaŭ Ĉun-ŝan, elmontris tre vivece kaj delikate la profundan animstaton de deokjara junulino en sia unua amo. En la malnova socio, li estis iufoje enkarcerigita por kvardek ok tagoj pro la ludo de ĉi tiu ŝatata de popolo danco.

La popolo amas la naturon: matenruĝo, sunsubiro, pluvetado, neĝblovado, pejzaĝo, plantaoj, ondanta maro, aŭ vasta kampo. Ĉio ĉi tio vekas en ili sentimentan ekscitiĝon. Ekzemple, la *Diversspecaj Birdoj Ricevas Aŭdiencon de Fenikso* hore ludata de la popolaj artistoj el Hupej- kaj Ŝantung-provincoj per

**Supre: Oktona Harmonio
Malsupre: Tekolekta Danco**



diversaj muzikiloj estas imito al pepoj de diversaj birdoj per blovinstrumentoj, manifestante la gajecon de la birdoj en la naturo.

La ĉina popolo estas speciale fame konata pro sia laboremo. Ili arde amas laboron. Ĉi tiu nobla kvalito plene manifestigas en la popola arto. La *Fiŝkaptado* ludata de artistoj de Ĉaŭgoŭ, urbo sur la marbordo de Kuangtung-provinco, per tamtamoj kaj tamburoj reflektis per muziko la laboron de fiŝkaptistoj. La tamburisto Ĉjoŭ Hoŭ-ŝang kiu jam havis kvindekjaran sperton en tamburado povas akordigi tamburmuzikon kun muziko de diversaj aliaj muzikinstrumentoj. La *Takor-danco* de Interna Mongolio estas danco kiu priskribas la ĉasistan vivon en la paŝtista regiono. La modulanta tono de ĉevalkapa kordinstrumento ludata de artisto Ŝerasi pentris la aspekton sur la stepo de Interna Mongolio.

Frue en 1942 post la paroladoj faritaj de Prezidento Maŭ ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jen'an, popola arto jam ricevis konsiderinde altan takson kaj ankaŭ atingis certgradan sukceson, ekzemple la reordigo de tiaj artformoj kiaj jangodanco, talitamburo, k. c.

Tamen, grandskala, planita kaj sistema reordigo de popola arto, unu el niaj kulturaj heredaĵoj, estas ebla nur dum la paca, konstrua tempo post la liberigo. En la malnova socio, la popola arto estis ege malestimata de la reganta klaso. Multaj popolaj artistoj fariĝis almoŝpetantoj vagantaj de loko al loko. La emancipo de ili kaj ilia arto estas ebla ankaŭ nur en la nova socio.

Dum la Festo, la Ministerio de Kulturo organizis pli ol okdek specialistojn en la laboro de muziko kaj dancoj kaj starigis studfakon por bone studi la popolan arton, diskutante kiel korekte koni kaj lerni ĝin, kiel forigi la superstiĉajn kaj postĝintajn elementojn en ĝi miksitajn, kaj kiel ĉerpi la bonajn kvalitojn el la malnova popola arto por pliriĉigi sian propran laboron.

Samtempe, la popolaj artistoj de ĉiuj regionoj kaj nacioj ankaŭ sin organizis en grupojn kaj ĉiutage ili reciproke rigardis siajn prezentadojn, diskutis kaj lernis, aŭ respektive invitis koncernajn literaturajn kaj artajn laborantojn por okazigi kunsidojn. Kiam ili rigardis la ludon de la Pekinaj artaj grupoj, ili ankaŭ profunde sentis ke multaj el la popolaj artaĵoj ankoraŭ bezonas prilaboradon kaj plialtigon sub la helpo de la profesiaj art-laborantoj por akceli la disvolvigon de la popola arto kaj pliriĉigi la kulturen kaj artan vivon de la popolo.

La Festo fermiĝis je la 14a de aprilo. Sed ĝi estis nur la nova ekiro de la disvolvigo de muziko kaj dancoj en nia lando. La ŝlosilo por malfermi la trezorejon de popola arto estas jam trovita kaj en la estonteco ankoraŭ multe da aliaj brilantaj gemoj en ĉi tiu granda trezorejo retroviĝos unuj post la aliaj.

* *Pestoforpela danco*

***Ŝeng: ĉina harmoniko el bambua tubetaro kun buŝblovlilo ĉe la malsupra parto. Ĝan: Speco de ĉina hobojo el simetria ligna tubo kun ses truoj kaj duobla langeto.*

La Drak-boata Festo

Ĉen Ting-joŭ

Laŭ la luna kalendaro, la kvina tago de la kvina monato en ĉiu jaro estas la Drak-boata Festo de Ĉinio. Tiu estas unu el la plej malnovaj kaj grandiozaj festoj de la ĉina popolo. Kune kun la Printempa Festo kaj Aŭtun-meza Festo, ĝi formas la tri grandajn festojn de la tuta jaro.


Pro la antikveco de tiu ĉi festo, oni ne havas rimedon por trovi ĝian veran originon. Laŭ la plej disvastigita onidiro, la festo devenas de la rememoro pri Ĉju Jŭan*, granda poeto kiu naskiĝis antaŭ pli ol du mil ducent naŭdek jaroj kaj tre amis sian patruon kaj popolon. Ĉju Jŭan estis nobelo de la regno Ĉu, unu el la sep potencaj regnoj dum la periodo de la Militantaj Regnoj (403 a. K.—221 a. K.) kaj kies teritorio konsistis el kelkaj provincoj en la baseno de Jangzi-rivero. Unue li ĝuis la konfidon de la reĝo de Ĉu kaj decidis la politikon de la regno, sed poste la reĝo kredis nur al la malfideluloj kaj ekzilis Ĉju Jŭan. Sekve de tio internaj kaj diplomaciaj aferoj estis tute fuŝitaj, la regno preskaŭ falis pro la superruzo de alia potenca regno, Ĉin, kaj la popolo ankaŭ multe suferis sub la subpremado de la fremda lando. Emociigite pro miskonfido de la reĝo kaj la malfeliĉa stato de sia lando, Ĉju Jŭan verkis multajn poemojn. Je la

kvina tago de la kvina monato en la jaro kiam li estis 62-jara, ne tolerante vidi mem la defalon de sia lando, li sin ĵetis en Milo-riveron norde de Ĉangŝa kaj finis sian tragedian vivon. Ĉar lia tuta vivo estis dediĉita al lia lando kaj popolo, li estas rememorigata de la vasta popolo generacion post generacio. La brilaj verkoj postlasitaj de li fariĝis literatura trezoro de Ĉinio. En tiu ĉi jaro okazas la 2230a datreveno de lia morto kaj la Monda Pac-konsilo jam decidis pri la rememorigo de tiu ĉi granda patriota poeto en mondskafo.

En la festotago drak-boatoj bele ornamitaj pafiĝis tien kaj reen sur multaj riveroj kaj lagoj en Ĉinio, partoprenante en la festa konkurso. La sonoj de cimbaloj kaj tamburoj sur boatoj kaj sur riverbordoj respondas unu la alian; la eksplodoj de krak-fajraĵoj aŭdiĝas jen sur la akvo, jen meze de la homamaso. Oni povas imagi ke en tio restas ioma bildo pri la penado de la tiama popolo por trovi la kadavron de Ĉju Jŭan. Sed nun, pro la antikveco de tiu evento, gaja humoro anstataŭas la iaman melankolian atmosferon.

En Ĉinio, okaze de preskaŭ ĉiu festo, oni preparas specialan manĝaĵon kaj la Drak-boata Festo ne estas escepto. 'Zungzi'—glueca rizo envolvita en speco de

bambu-folioj kaj bolkuirita— estas aparte pretigita manĝaĵo por tiu ĉi festo. En iuj lokoj oni jetas tian manĝaĵon en riverojn. Laŭ malnova legendo, post kiam Ĉju Jŭan sin dronigis en Milo-rivero, lia edzino ofte ĵetis manĝaĵon tien kiel oferaĵon al li. Por ke la drakoj ne forkaptu la oferaĵon, ŝi envolvis la rizon per bambu-folioj kaj ligis ĝin per diverskoloraj silkfadenoj kaj poste ĵetis ĝin en la akvon.



Ĉar, laŭ onidiro, la drakoj timas bambu-folion kaj diverskoloran silkfadenon. Sed, laŭ alia legendo, oni ĵetis tion por nutri la drakojn, dezirante ke ili ĝin manĝu anstataŭ la kadavron de Ĉju Jŭan.

En la mateno de tiu festotago, ĉiuj hejmoj enfiksas, apud la pordo, akoron kiu simbolas spadon kaj artemizion aranĝitan en la formo de tigro. Ĉe la muroj kaj ĉambro-anguloj oni verŝas kalkon kaj orpimento-vinon. Sur la festa manĝotablo ofte troviĝas, krom 'zungzi', vino kun orpimento aŭ akoro kaj kukoj kun desegno de vermoj kaj serpentoj.

Okaze de tiu festo virinoj okupiĝas pri sia speciala laboro. Ili faras etajn tigrojn el silkaĵoj aŭ silkfadenoj, "fadenon de longviveco" el diverskoloraj silkfadenoj kunligantaj etajn ludilojn, aŭ "kvin feliĉojn" el paperotonditaj lagenarioj, vespertoj, ktp. kiujn ili pendigas sur la koloj de infanoj. Laŭ onidiro, ĉio ĉi tio esprimas la deziron de longviveco al la infanoj. Pro la vasteco de la teritorio de Ĉinio, tiuj ĉi moroj iom varias en formo laŭ regiono.

Kompreneble, tiuj kiuj plej ĝojas estas la infanoj. Multajn tagojn antaŭ la festo, ili jam kalkulas per siaj fingretoj kiam ĝi alvenos. Ĉar en tiu tago ili ne nur havas bonajn manĝaĵojn kaj surmetas belajn vestojn, sed iliaj gepatroj ankaŭ aĉetas por ili interesajn ludilojn. La knabinoj surportas ankaŭ freŝajn aŭ artefaritajn florojn el flanelo kaj parfumpaketojn.

Nun neniuj povas klarigi ĉu tiuj tradiciaj moroj kiuj daŭris por kelkaj jarmiloj havas la saman originon aŭ kion ili signifas. Oni diras, ke akoro-spado kaj artemizio-tigro forpelas malbonajn kaj malvirtajn spiritojn. Ĉar Ĉju Jŭan mortis pro la subpremado de malbonaj malvirtuloj, la antikvuloj opiniis, ke tiu tago estas malfeliĉa tago kiam diversaj fispiritoj senbridigas. Tiaj moroj kiel verŝado de kalko, trinkado de orpimento- aŭ cinabro-vino kaj surportado de parfumpaketoj ŝajnas enhavi en si la ideon pri desinfektado kaj malsano-antaŭzorgado, ĉar post la Drak-boata Festo la vetero fariĝas pli kaj pli varma kaj malutilaj insektoj kaj mikroboj multobliĝas. Do, el tio estas klare videbla ia higiena kutimo de Ĉinio en la antikva tempo.

Post la liberigo, tiu gaja kaj vivoplena sceno de la malnova festo restas sama kiel antaŭe. Pro la paŝo-post-paŝa plialtigo de la popola viv-nivelo, la kooperativoj, bazaroj kaj manĝaĵo- kaj frukto-vendejoj en diversaj lokoj estas plenplenaj de klientoj kelkajn tagojn antaŭ tiu festo. Se oni ne pretigus sufiĉe da provizoj, multaj homoj ne akirus siajn festajn manĝaĵojn.

Estas nature ke ne troviĝas multe da homoj kiuj ankoraŭ kredas ke diversaj diabloj kunvenas kaj ke

oni bezonas akoro-spadon kaj artemizio-tigron por forpeli malbonon kaj malvirton. Higieno jam fariĝis ĉies ĉiutaga praktiko kaj oni faras higienan laboron ne nur okaze de la Drak-boata Festo. Krom kalko kaj orpimento-vino, aldoniĝis la desinfektaĵoj D.D.T., fenolo, ktp. B.C.G. bovin-vakcino, kontraŭdifteria sero, kaj aliaj jam anstataŭas "fadenon de longviveco" kaj "kvin feliĉojn." Sed junio estas tempo kiam la rizo estas transplantita en la sudo kaj plejparto de la tritiko estas rikoltita en la nordo kaj la terkulturistoj ne havas laboron dumtempe. Ĉu tiu ne estas konvena tempo por la terkulturistoj kiuj konsistigas pli ol 80 procentojn de la ĉina popolo ripozi kaj iom ĝui post diligenta laborado? Ili vidas la prosperiĝantajn junajn elkreskaĵojn, la riĉan frukton de sia laboro (ĉio ĉi tio fariĝis, post agrara reformo, ilia propra posedaĵo kaj ili ne plu ilin oferas al la bienuloj). Kial ili ne esprimas sian ĝojon sin amuzante okaze de tiu festo kiu estas poezia kaj plena de belaj legendoj kaj rakontoj?

La ĉinaj popolanoj neniam forgesas tiujn homojn kiuj kreas kaj protektas ilian feliĉon dum tiu gaja festo. Tial, krom la malnovaj kutimoj, la liberigita ĉina popolo aldonis novan programon por la Drak-boata Festo. En diversaj lokoj tra la tuta Ĉinio oni faras specialan aranĝon favore al la familianoj de la batalantoj en servado aŭ jam mortintaj. Al ili la konsol-grupoj (konsistantaj ĝenerale el strataj aŭ vilaĝaj loĝantoj kaj la laborantoj de distriktaĵoj aŭ vilaĝaj registaroj), tenante flagojn kaj akompanate de la muziko de cimbaloj kaj tamburoj, sendis la 'zungzi', kino- kaj park-biletojn ktp. donacitajn de la registaro kaj adresas intimajn konsolojn. Al ili ankaŭ multaj vendejoj memvole vendas artikolojn je pograndaĵa prezo por ke ili ĝuu pli bone tiun gajan feston.

En tiu ĉi jaro, pro la decido de la Monda Pac-konsilo memorigi Ĉju Jŭan, la Drak-boata Festo sendube fariĝos pli grandioza. Oni okazigos memorkunvenojn en multaj lokoj, krom la tradiciaj kutimoj kelkmiljaraj. Multaj kleruloj, kiel Ĝeng Ĝen-to, estro de la Literatura Kolegio de Pekina Universitato kaj aliaj, publikigos artikolojn pri Ĉju Jŭan. "Ĉju Jŭan", fama teatraĵo verkita de S-ro Kuo Mo-jo estos denove prezentata. La malnova Drak-boata Festo disradios novan brilon. Tio stimulas la tutmondan popolon valorigi la kulturen heredaĵon de la homaro kaj tiel plifortigi ilian decidemon akiri mondpacem kaj defendi kulturon.

* Detalan priskribon pri Ĉju Jŭan la leganto bonvolu legi p. 105-106 de la maja numero de tiu ĉi gazeto.

Survoje al Kinejo

Gang Tjan-ji

Hunjo supreniris stratramon. Ŝi iris por rigardi la kolorfilmon, 'La Malgranda Gardenisto.'

Ĉiuj ŝiaj kunlernantoj jam vidis ĝin. Ĝi prezentiĝis en marto de la kuranta jaro. Sed tiam Hunjo malsaniĝis pro la tiel nomata 'gripo' kaj panjo ne permesis ŝin iri al la kinejo.

Ŝi ofte aŭdis la kunlernantojn babiladi pri 'La Malgranda Gardenisto.' Ju pli ofte ŝi aŭdis, des pli ardis ŝia deziro vidi ĝin propraokule. Sed oni ne scias kien tiu filmo vagadis. Ŝi ĉiam atendis kaj atendis.

Iun tagon—sabaton, tio estas, hieraŭ—ekaperis en gazeto la anonco pri 'La Malgranda Gardenisto': je la naŭa matene de dimanĉo, prezentota nur unu fojon.

Ŝi fine ĝisatendis! Ĉifoje panjo donis al ŝi la permeson.

Ŝi staris en la tramo. Ŝia vizaĝo ruĝiĝis kaj ŝvitis. Senpacience ŝi rigardis tra la fenestron.

La stratoj estis trafikplenaj de homoj. La tramo kuris nerapideme, sonorigis ĝentile kaj montris nenian malpaciencon:

"Flanken, he flanken!"

"Restas ankoraŭ tri stacioj..." kalkulis Hunjo.

Iu onjo tiris ŝin per la mano, ĉar ĵus troviĝis libera sidloko apud ŝi. Hunjo ridetis al la onjo kaj sidigis obeeme. Ŝi ekvidis sur la benko libreton kun leda kovrilo—kajeron el ne binditaj folioj kiu servis kaj kiel monsaketo kaj kiel notlibro. Tiam ankaŭ paĉjo havas. Sed tiu ĉi ne estas bruna, sed hele flava. Ŝi demandis:

"Ĉu ĝi apartenas al vi, onjo?"

"Ne, ĝi ne estas mia."

Hunjo levis la libreton kaj kriis:

"Kies notlibro? Kies?"

Sed neniu deklaris sin kiel ĝian posedanton. Iu maljuna oĉjo diris:

"Ĝi certe apartenas al tiu kamarado kiu ĵus malsupreniris."

Tiam pluraj voĉoj laŭte vokis tra la fenestroj:

"He, kamarado, vi postlasis ion en la tramo!... Kamarado!"

Ankaŭ Hunjo levis la libreton ĉe la fenestro:

"Oĉjo, oĉjo!"

Verŝajne tiu oĉjo ne aŭdis. Li jam supreniris la trotuaron kun nigraleda paperujo sub la brako. Li haltis momente kvazaŭ pensante pri io kaj denove iris orienten.

"Mi portos ĝin al ĵi."

Ŝi boris sian vojon tra la homamaso kaj desaltis de la veturilo, kiam la bilepisto estis jam fermonta la pordon.

La tramo ekmoviĝis. Ĉe la fenestroj paroj da okuloj ĵetis zorgeman rigardon al Hunjo kaj la stratramo jam preterrapidis tondrante.

Hunjo staris ĉe la vojrando kun la notlibro en la mano. Ŝi staris sur piedpintoj kaj serĉe rigardis, iris sur la trotuaron kaj staris refoje sur piedpintoj por rigardi. Sed ŝi ne povis trovi tiun oĉjon. Ŝi kuris kelkajn paŝojn orienten kaj supren saltis por rigardi ankoraŭfoje. Same vane.

Ŝi estis kuronta ree, sed hezitis:

"Ĉu mi denove estas tiel malkvieta ke mi fuŝas la aferon?"

Efektive, se vi kvietigus vin kaj rigardus ĉiudirekten vi ja povus rimarki, ke iu iras malrapide trans la strato kun nigra-leda paperujo sub la brako kaj nun turnas sin al la sudo.

Laŭaspekte li tute ne konsciis ke li perdis sian notlibron. Li ekvidis, ke iu knabino kun ruĝa koltuko kuras post li—

"Oĉjo, vi ion perdis!"

Li haltis kaj gapis konfuzite.

Hunjo metis ambaŭ manojn post la dorso, penis reguligi sian spiradon kaj demandis:

"Vi ĵus forlasis la stratramon? Bonvolu kontroli, kion vi perdis."

Tiu oĉjo promenigis la rigardon sur sian korpon kaj ĉiudirekten. Li palpebrumis kaj cerbumis momente kvazaŭ serĉante solvon de enigmo. Poste li rigardis al Hunjo kvazaŭ dirante:

"Bonvolu eldiri, mi konfesas, ke mi malvenkas."

"Ĉu vi perdis ian notlibron?"



Trovinte la nomon de la perdinto sur la bileto, Hunjo cerbumas kiel trovi ŝin.

"Notlibron?" Li transdonis la ledan paperujon, kiu estis sub la maldekstra brako, al la dekstra mano kaj traserĉis la maldekstran poŝon.

"Nu, ĝi estas tie ĉi. Ne perdit. Rigardu jen!"

"Eble ankoraŭ alian vi havas?"

"Ne, mi havas nur tiun ĉi."

Hunjo embarasiĝis:

"Tio signifas, ke la notlibro apartenas al alia oĉjo!"

Ŝi turnis sin kaj forkuris.

"He, amiketo!" Tiu oĉjo ekmemoris pri io kaj haltigis ŝin. "Mi forgesis diri dankon al vi. Kvankam la notlibro, kiun vi trovis, ne apartenas al mi, tamen mi devas esprimi mian dankemon."

Hunjo fortunigis kaj kuris. Kien? Eĉ ŝi mem ne klare sciis.

Kia infaneco!

Kiam ŝi estis infaneto, ŝi efektive agis iom malkviete. Instruistino Ĉen parolis pli ol unufoje kun panjo pri tio. Nun, la somera libertempo finiĝis kaj ŝi jam iris en la kvinajarajn klason. Tio signifas, ke ŝi estas lernantino de la superaj klasoj kaj oni povas rigardi ŝin kiel grandan—nomi ŝin granda ne estas tute ĝuste, kompreneble, sed almenaŭ ŝi povas esti konsiderata kiel granda infano.

Granda infano faras ĉion ordeme, escepte kiam oni havas ion tre urĝan por plenumi—ekzemple kiam oni iras rigardi belegan filmon.

Nun ŝi ekmemoris la parolon de instruistino Ĉen: "Hunjo, vidu kiamaniere vi devas agi? Unue pripensu kun atento."

Ĉiam okazis tiel: ju pli maltrankviligis Hunjo, instruistino Ĉen montris sin des pli aplomba kaj ŝia tono sonis des pli kvieta. Estas tre mirinde, ke tiam ankaŭ Hunjo trankviligis kaj ne plu konfuziĝis kiel antaŭe.

Do pripensu.

Kie forlasis la stratramon tiu oĉjo, kiu perdis la notlibron? Tion ŝi ne sciis. Unuvorte li ne estis trovebla ĉe tiu ĉi haltejo. Do—

"Mi portos la notlibron al la lernejo..."

Ne, preferinde al la ĉi-tiea sub-policejo. Tio bezonas maksimume kvin minutojn.

Sed ne estu tro rapidega. Antaŭ ĉio rigardu en la notlibron, kaj vidu, kio troviĝas tie.

Sur multaj paĝoj estis densdense skribitaj vortoj. Kompreneble ĝi estis notlibro kaj por laboro kaj por lerno, same kiel tiu de paĉjo. En la kovril-poŝo troviĝis fasko da bankbiletoj. Hunjo elprenis la bankbiletojn kaj intencis ilin kalkuli, subite heleblua paperslipo falis flirtante sur la teron. Ĝi estis enir-bileto.

"Kia enir-bileto?" Sed tio ne estis indikita. Nek la loko. Sur ĝi ronda blua stampo frapis la okulon, sed la surskribon ĝi ne scipovis deĉifri. La dato—hodiaŭ. Tempo—la deka matene. "Nur validas por unu persono. Ne transdonu ĝin al alia!"

Ĉe la angulo troviĝis kelkaj inke skribitaj vortoj:

"Kamaradino Ŭang Fen."

"Ha, mi malkovras fine kies ĝi estas!"

Nun oni povas publikigi anoncon en la gazeto 'Ĉinaj Geknaboj' por serĉi tiun Kamaradinon Ŭang Fen. Iutage Kamaradino Ŭang Fen legos la gazeton kaj ŝi povos iri al la sub-policejo por repreni sian notlibron kaj tiun ĉi enir-bileton...

Tamen hodiaŭ matene je la deka Kamaradino Ŭang Fen devas partopreni iun kunvenon kun tiu ĉi bileto—eble tre gravan kunvenon!

Kion fari?

Tempo forflugadis sekundon post sekundo kaj minuton post minuto. Malfacila problemo. Ŝi sincere dezirus submeti la problemon al la kunlernantoj: Kamaradoj, bonvole esprimu libere viajn opiniojn! Tiam oni aŭdus multe da proponoj kaj rimedoj. Ŝi jam kvazaŭ aŭdis, ke du infanoj disputas. Jen unu diras:

"Kial Hunjo prenis la notlibron en la tramo? Se ŝi ne prenis ĝin..."

Dua infano tuj rebatas akre:

"Laŭ via opinio, Hunjo devis forjeti alies gravan aĵon senzorgeme: 'Ĉu ĝi koncernas min? Mi prefere iras ludi la tablo-kroketon!' kaj forkuri kun bruaj paŝoj tute ne zorgante, ĉu iu fripono ĝin forportus. Ĉu tiel? Sed Hunjo ne estas tia infano. Ŝi estas ja ano de la Korpuso de Junaj Pioniroj."

"Kio!" krias la unua. "Forĵeti alies aĵon senzorgeme kaj iri ludi tablo-kroketon estas ne prave, kompreneble. Tablo-kroketo estas nur bagatelo. Hunjo ne iras ludi tablo-kroketon. Ŝi iras al la kinejo por vidi belan filmon. Ŝi jam atendis tre, tre longe. Tiu estas neordinare bela filmo! Ege interesa! Cetere oni ĝin prezentas nur tiun ĉi unu fojon. Jen la punkto!"

"Diru do, kio estas pli grava? Ĉu la ĉeesto de Hunjo al la spektaklo de bela filmo aŭ la partopreno de Kamaradino Ŭang Fen al grava kunveno?"

La unua respondas:

"Kompreneble ambaŭ estas gravaj. Tamen Hunjo povas iri al la kunlernantoj kaj demandi: 'Ĉu vi vidis 'La Malgrandan Ĝardeniston?' 'Ĉiuj vidis.' 'Haha, bonege! Bonvole faru por mi iron, kio estas servi al la popolo.' Tiam ŝi povas komisi la notlibron al la kunlernantoj kaj mem iri al la kinejo."

"Tiukaze Hunjo unue petos vian helpon..."

(daŭrigo sur p. 130)

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 6

E N H A V O

Bildo sur la kovrilo—Infanoj de infanvartejo ricevas inokuladon kontraŭ difterio

Ni Konstruas por la Infanoj kaj Paco

Reveno al Libero ĉe Kaesong

La Popola Aŭdienco de la Pekina Popola Registaro

Blovfornego N-ro 8

Mi Amas Miajn Infanojn

La Sepa Tutĉinia Kongreso de Sindikatoj

Novtipa Elektrejo

Impresoj pri Lhasa

Kaŝita Arttrezoro Malkovrita

La Drak-boata Festo

Survoje al la Kinejo

La Ĉinaj Ovoj kaj Ovo-produktaĵoj

La Ĉinaj Ovoj kaj Ovo-produktaĵoj

J. C. Ĝaŭ

Ĉinio estas unu el la plej grandaj eksportantoj de ovo kaj ovo-produktaĵoj en la mondo. En 1936, la jaro kun plej alta rekordo, Ĉinio eksportis entute kvanton egalan al 2,722,080,000 freŝaj ovo—47,826 tunoj da glaciigitaj ovo-produktaĵoj, 9,073 tunoj da sekigitaj ovo-produktaĵoj kaj 380 milionoj da freŝaj ovo. Tiuj ovo kaj ovo-produktaĵoj iris ĉefe al Anglio, Usono, Germanio, Francio, Belgio, Japanio, la Filipinaj Insuloj, Indonezio kaj aliaj centroj en la Suda Pacifiko.

La eksporto de freŝaj ovo, salitaj ovo kaj konservitaj ovo el nia lando komencigis en la fino de la deknaŭa jarcento. Frue en la dudeka jarcento oni komencis eksporti sekigitajn kaj glaciigitajn ovo-produktaĵojn. Sed rezulte de la ruinigo de nacia ekonomio pro la japana invado de 1937-45 kaj la misregado de Kuomintanga reakciularo, plejparto de la ovo-procedaj fabrikoj en Ĉinio bankrotis kaj fermiĝis. La eksporto de ovo-produktaĵoj malpliĝis ĝis la plej malalta nivelo. Tio donis severan baton al la jam sen tio tre malriĉaj kamparanoj kies ĉefa flank-okupo estis kortbirdo-bredado.

Spektakla Reboniĝo

Tamen, post la liberigo, sub la influo de la multaj produktaj stimuloj en nova Ĉinio, la stato de ovo-produktado kaj -eksportado rapide reboniĝis. La produktado de freŝaj ovo en 1952 plialtiĝis 43 procentojn kompare kun la normala produktado dum la jaroj inter 1930 kaj 1940.

Nun Ĉinio povas plenumi mendojn kiuj superas ne malmulte antaŭmilitajn postulojn kaj ankoraŭ plialtigas la produktadon por la bezono de la enlanda merkato kiu konstante pligrandiĝas pro la plibonigo de la popola vivo.

Ĉinaj terkulturistoj, kiuj viciĝas inter la plej lertaj kortbirdo-bredistoj, pligrandigis rapide la nombron de siaj kortbirdoj, kiam ili ricevis sian teron dum la agrara reformo kaj sekve povis pli bone provizi la kortbirdnutraĵon. Per la helpo de la Popola Registaro la ovo-procedaj fabrikoj preskaŭ ĉiuj refunkcias. Ovo-kolektado kaj -vendado pere de kooperativo, registara helpo en la formo de mon-prunto, impost-liberigo, plibonigita komunikado, k. c., kontribuas al la revivigo de la ovo-eksporto kiu iom post iom revenas al la plej alta rekordo.

Altkvalitaj Produktaĵoj

Unu kaŭzo de la populareco de ĉinaj ovo kaj ovo-produktaĵoj en la monda merkato estas tio ke ili enhavas riĉan grason. La nombro de kortbirdoj bredataj en milionoj da

apartaj terkulturistaj hejmoj estas malgranda. Ili estas bone prizorgataj kaj nun ricevas sufiĉe da nutraĵo. Unu kilogramo da tiaj ovo enhavas 24.88 gramojn da graso kompare al la 22 gramoj aŭ malpli en kelkaj fremdaj landoj. Krome, la ovo-produktaĵo de Ĉinio estas tute preparitaj el senbakteriigitaj freŝaj ovo kaj la normo de kvalito, grasoenhavo, k. c. de eksportotaj produktaĵoj estas severe ekzamenitaj sub la kontrolado de la Buroo por Ekzameni Komercaĵojn de la Ministerio por Fremdlanda Komercio.

La iam bankrotinta ovo-proceda industrio estas restarigita sub ŝtata gvidado kaj helpado, donante grandan profiton al la procedaj fabrikoj kiuj estas ĉefe privataj entreprenoj kaj konvenan prezon al malgrandaj produktantoj. Novaj merkatoj estas kreataj, kaj al malnovaj klientoj produktaĵoj estas provizataj de la Ĉina Landa Nutraĵo-eksporta Kompanio, ŝtata organizo nun entreprenanta ĉiujn ovo-eksportojn.

Malkaraj Prezoj

Ĉinaj bon-kvalitaj ovo kaj ovo-produktaĵoj estas malkaraj; ĝenerale, ili estas ĉirkaŭ 10 procentojn pli malkaraj ol tiuj produktitaj en Usono. La popolanoj de Usono profitis de la aĉetado de kelkmil tunoj da ovo-produktaĵoj el Ĉinio en 1949 kaj en la unua duono de 1950; ankoraŭ pli multe profitis la Okcidenteŭropaj landoj, precipe Britlando. Rezulte de la Usona malhelpo en la normala funkciado de negoco, Britlando, ekzemple, importis multe malpli da ovo-produktaĵoj el Ĉinio en la dua duono de 1950 kaj en 1951. Nutraĵoj konsistantaj el ovo aŭ ovo-produktaĵoj farigis pli karaj kaj estis de malpli bona kvalito. Tamen, en 1952, sekvante pli saĝan konsilon Britlando denove aĉetis el Ĉinio multe da ovo-produktaĵoj. La *Financial Times* reprezentanta Britlandan financon rondon asertis je la 9a de aŭgusto, 1951: "En la produktado de bakitaĵoj estas neeble trovi taŭgajn anstataŭaĵojn por la ovo importitaj el Ĉinio."

Pro la pliprosperiĝo de agrikultura produktado kaj la enlanda produktado de bona kortbirdo-nutraĵo en Ĉinio, eĉ pli bonaj kondiĉoj sin prezentas por kortbirda bredado. Oni jam faras planojn por la disvolvo de modernigitaj kortbirdobredejoj kaj, krome, se ĉiu el la 100 milionoj da terkulturistaj familioj bredus unu plian kokinon, la produktado de ovo estos plialtigita je pli ol 10,000 milionoj ĉiujare. Tio alportos pli da ovo al la manĝotabloj de la ĉina popolo kaj ankaŭ pligrandigos eksporton de ovo kaj ovo-produktaĵoj al milionoj da homoj en fremdlandoj kiuj ilin bezonas.